

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**Togolanda
kongreso radias
translimen**



**Kongresa
Komuniko 2**



**Kniivilä pri
retuloj kaj
senretuloj**



UK: Alrigardos nin jarmiloj

Vi trovos...

- 21 **Malferme**
Esperantujo en la sepa kontinento
Kalle Kniivilä

- 22 **MIRAKLO EN MEZAĜA STATO**
Josef Šemer

Foto travigita de Israelaj lurnamaj instancoj

- 26 **Kongresa komuniko 2**
- 27 **Arangoj**
20-jara IF festis kun rekordo
Jouko Lindstedt
Estonta IIK jam virtuala sukceso

- 28 **Afriko**
Ĉu eko de EKOA?
GBEGLO Koffi
Kristnaskaj vizitoj
Henriko O. Ogúinye

- 29 **Navige tra TTT-paĝoj**

- 30 **Notu bone**

- 31 **Reagoj**

- 32 **Recenzoj**

Gerrit Berveling pri
Imitado de Kristo

Garbhan MacAoidh pri
Tolero al minoritatoj kaj
Eŭropa ideologio

Leif Nordenstorm pri
Paĉjo, kio estas rasismo?

Jesper Lykke Jacobsen pri
ses brazilaj beletraĵoj

- 35 **Laste aperis**



Kaj plue...

- 36 **Persone**

- 37 **Loke**
Anoncetoj

- 38 **Influe**
Oficiala informilo

- 39 **Foliume**

- 40 **Forpasoj**

La kovrilo: Franca miniaturo (1455) pri Jerusalemo

Dekstra paĝo: Alaskaj fokoĵoj (Marianne Vermaas)

ESPERANTO

*Oficiala organo de
 Universala Esperanto-Asocio
 (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Veuthey.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotfino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gl.

Anonctarifo (eŭroj): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



ESPERANTUJO EN LA SEPA KONTINENTO

Estas ĝojige konstati ke ĉiam pli rapide disvastiĝas la uzo de Esperanto en Interreto. En tiu nova, kvazaŭ senlima sepa kontinento ĉiam pli da esperantistoj sentas sin same hejme kiel en la tradicia, malvirtuala Esperantujo. Jam ne gravas ĉu estrarano de UEA sidas en Japanio aŭ Togolando, Ĉeĥio aŭ Italio — la kunsido neniam ĉesas.

Eĉ se la nova kontinento de Interreto estas same senlima kiel Esperantujo, gravas memori ke ankoraŭ ne la tuta mondo transmigris tien. Ne ĉiuj havas monon por la bileto. Ankaŭ en Svedio, kiu estas unu el la pintaj landoj de la nova elektronika revolucio, duono de la loĝantaro ankoraŭ ne havas aliron al la reto. En multaj aliaj landoj la majoritato eĉ ne havas propran telefonon. La reto estas ne nur grandioza internacia ligilo, ĝi estas samtempe ankaŭ nova barilo, kiu dividas la mondon.

Internacia lingvo estas kompreneble bezonata tie kie plimultiĝas internaciaj kontaktoj. Tial ni ne rajtas neglekti la novan kontinenton, kien ĉiutage migras miloj da homoj sen antaŭa sperto pri regula interrilatado kun alilingvanoj. Interreto bezonas Esperanton, kaj Esperanto bezonas Interreton.

Tamen ne nur preskaŭ ĉiuj esperantistoj en evolulandoj, sed eĉ la plimulto de niaj samlingvanoj en la plej riĉaj partoj de la mondo daŭre restas ekster la

nova kontinento — malgraŭ ke ĉiam pli granda parto de nia komunikado okazas per retroŝto, kaj kelkfoje aktualaj informoj pri aranĝoj kaj renkontiĝoj haveblas nur per la reto. Necesas ke la reta generacio ne izoliĝu: ĝi ne rajtas forgesi tiujn al kiuj mankas la bileto al la nova kontinento. Sed ankaŭ indas ke spertaj movadanoj kiuj ĝis nun restas ekster la retaj diskutforumoj, konsideru ĉu ilia sperto ne povus utili ankaŭ en la nova medio.

Same kiel multaj esperantistoj ankoraŭ hezitas ĉe la pordo de la nova kontinento, multaj enretaj esperantistoj preferas diskuti, amuziĝi kaj kvereli en siaj propraj rondoj ol malfermi sian retan Esperantujon al la cetera publiko de la ret-lando. Tio ne mirindas: la reto estas ne nur ideala ilo por senlima tutmonda komunikado, ĝi ankaŭ proponas perfektajn ejetojn por amikaj rondetoj.

Se Esperantujo ekzistas ie, ĝi ekzistas en Interreto. En la lastaj jaroj la reto eksplode kreskigis la kvanton de regulaj internaciaj kontaktoj de la ordinaraj esperantistoj, kaj jam per tio ĝi faris grandan servon al nia lingvo. Sed ankoraŭ la limoj de la reta Esperantujo estas tro altaj, ne sufiĉe estas farite por prezenti nin al la ekstera publiko en la reto.

Ni ne timu la novan kontinenton, ni igu ĝin la nia!

Kalle Kniivilä



Nia kongreslando: Jarminoj da

Miraklo en mezaĝ

Tel-Avivo, aventura kaj ĝuinda

Tel-Avivo estas urbo ĉe marbordo, kiu neniam ripozas.

Ĝi situas ideale en la centro de Israelo: el ĝi preskaŭ ĉiun lokon vi aliros per unutaga ekskurso, kaj ĝi mem estas facile atingebla de ĉie en la mondo. La ĉefa enirejo al Israelo, la flughaveno Ben-Gurion, troviĝas je veturdistanco de nur 20 minutoj. Krome, preskaŭ ĉie en la urbo vi proksimas al la marbordo: Tel-Avivo estas mediteranea feriejo kun multaj sablaj plaĝoj, kies varmeta akvo agrable invitas por bano kaj mar-sportoj. Jen do ideala loko por liber-tempi, kongresi kaj vojaĝadi.

Mondo da aventuroj kaj ĝuoj atendas la promenanton en Tel-Avivo. La altaj konstruaĵoj kiuj tranĉas la ĉiel-linion apud la marbordo, iom spegulas la naturon kaj la ritmon de la urbo, kie ĉemara promenejo, haveneto, kafejoj, restoracioj kaj nokta vivo logas nerizisteblajn turistojn kaj lokanojn. Post kiam la vesperaj lumoj vekas la urbon al nokta vivo, multaj kafejoj, diskejoj, restoracioj kaj trinkejoj funkcias ĝis malfrua horo. Agrablas ankaŭ nokta promonado ĉe la marbordo, precipe somere aŭ printempe.

Promeno en antikvon

Post duonhora piediro vi atingas la bibli-epoke antikvan urbon Jafo. Ĉi tie ekkreskis la nova Tel-Avivo komence de la 20-a jarcento. En Jafo la profeto Jona komencis sian vojaĝon al la gorĝo de baleno, kaj laŭ la greka mitologio Andromeda fariĝis roko ĝuste en la maro de Jafo.

En la koro de Tel-Avivo, absolute nemaltrafinda loko estas la triangulo de la stratoj Sejnkin, Nahalat-Binjamin kaj la Karmel-bazaro. Ĉi tie vi povas rigardi kaj enspiri junecan strat-vivon. En la strata vendejaro de Nahalat-Binjamin vi renkontos muzikon, etoson, homojn kaj belajn artaĵojn. Proksime situas Karmel, la plej granda israela subĉiela bazo: kaoso da komerco, odoroj kaj koloroj. En la placo Kikar Hamedina kaj ĉe la kruciĝo de stratoj Dizengof kaj Zamenhof (!) vi trovos vestaĵojn de dezajnistoj internacie famaj kaj lokaj. En Jafo, simile alloga loko estas la unika mediteranea pulbazo, en kiu troveblas verŝajne ĉio...

☞ p. 25

La lando kie ni kongresos sojle de la 21-a juna ŝtato kun forto de plurmiljara tradicio. Israelo Josef Ŝemer, sekretario de Loka K



Supre: La Blanka Placo (1987-88, verko de Dani Karavan) en Tel-Avivo.
Dekstre: Rigardo al la Malnova Urbo en Jerusalemo.



Mur antaŭ nelonge, en 1998, Israelo festis sian 50-jaran jubileon: ĝi estis fondita en 1948.

Antaŭ kvin jardekoj en ĉi tiu regiono vivis 600 mil judoj kaj 1,25 milionoj da araboj (palestinanoj), sub brita regado. Hodiaŭ loĝas 5 milionoj da judoj kaj miliono da nejudoj (tri-kvarone islamaj araboj) en la firme suverena, ekonomie alte

Ŝtato

jarcento, unike kombinas elanon de
io. Per pluraj artikoloj invitas vin al
ongresa Komitato, loĝanto de Tel-Avivo.



Fotoj naviguist de israelaj turistaj instancoj

evoluinta, tute moderna juda ŝtato, neniel komparebla kun la ŝtateto ĵus naskiĝinta en la militŝtormo de 1948.

Aliflanke, neniu hodiaŭ pridubas ke la nuna Israelo plenumas nur parton de la revoj kaj aspiroj de siaj fondintoj. La cionisma movado deziris (kaj deziras) kunvenigi en la judan ŝtaton ĉiujn membrojn, aŭ almenaŭ la plimulton, de la juda popolo. Sed tio ĉi ne efektiviĝis: nur triono aŭ duono de la tutmonda judaro israelaniĝis.

p. 24

Jerusalemo, sankta kaj sekulara

Jerusalemo estas samtempe subĉiela muzeo kaj vigla, moderna urbo, kie la pasinteco vivas ene de la nuno.

Orkolora sunleviĝo spegulata de ĉiu konstruaĵo; nigre vestitaj viroj kaj knaboj, kiuj rapidas al la sinagogo; intermiksitaĵoj de preĝejoj kaj sonoriloj kaj de muezinaj vokoj al preĝo; la ĉirkaŭhasto de la homoj, kiuj iras al siaj ĉiutagaj aferoj: ĉio tio tentas la sensojn en la plej eksterordinara urbo en la mondo, Jerusalemo.

La energio de Jerusalemo esprimiĝas en la interago de antikvo kaj moderno, de sankto kaj sekularo, de la surtera kaj la spirita. Vizito al la Sankta Urbo estas valora sperto: ĉi tie la ekscita nuntempo vivas apud la historia pasinteco.

Ĉiutago kaj sublimo

De kiam la reĝo Davido elektis antaŭ 3000 jaroj Jerusalemon sia ĉefurbo, kaj lia filo Salomono konstruis la Unuan Templon, la nomo de la urbo elvokas ĉiam imagojn de beleco kaj respekto, aktiveco kaj ekscito. Kaj hodiaŭ, same kiel dum la antikva tempo, Jerusalemo estas samtempe destino de sennombraj pilgrimantoj, sidejo de registaro kaj vigla metropolo, kiu vidigas ĉion ĉiutagan kaj subliman.

Estas stimule promeni tra kelkaj el la kvartaloj kun unika karaktero: jen ortodoksaj judoj konservis la etoson de orient-eŭropa urbo; jen malfermiĝas panoramo al la Antikva Urbo kaj ĝiaj muregoj; en tria kvartalo staras domoj de la turka epoko kaj artgalerioj; kaj en kvara, sine de la Antikva Urbo, arabaj komercistoj ofertas buntajn varojn en oriente pitoreska bazaro ĉiohava.

Pilgrimejo de tri religioj

Dum la biblia epoko la judoj pilgrimis la Templon tri fojojn jare, dum la festotagoj, por plenumi la religian devon de la oferdonado. Estis la pilgrimo de Pasko kiu venigis Jesuon Kriston al la Urbo. Laŭ la tradicio la nokta rajdo de Mahometo ĉielen, por tie ricevi la Sanktan Koranon, ekis de la Templo Monto.

Tial ĉiuj tri monoteismaj religioj estas intervenintaj en la teksaĵon de la urbo, per okazigo de pilgrimoj al siaj respektivaj sanktaj lokoj: judoj al la Okcidenta Muro de la Templo Monto kaj al la trezoroj de la Juda Kvartalo; islamanoj al la gloraj moskeoj ĉe la pinto de Monto Moriah; kaj kristanoj el ĉiuj konfesioj al la multnombraj preĝejoj konstruitaj en la lokoj kie Jesuo Kristo pasis.

Kredantojn el ĉiu religio nutras persona "Jerusalemo de la Spirito".

Universalaj valoroj – universalaj trezoroj

Jerusalemo eksponas siajn artefaktojn de la pasinteco kaj la trezorojn de la moderna epoko diversmaniere, de arkeologiaj parkoj ĝis subĉielaj skulptaĵoj de famaj artistoj. La parlamentejon (Knesset) ornamas tapisierio de Marc Chagall. En la Sanktejo de la Libro kuŝas la valoregaj pergamenrulaĵoj de la Morta Maro, skribitaj de ermitoj kiuj vivis en kavernoj antaŭ 2000 jaroj.

Tre vizitindas la fama Muzeo de Israelo kun siaj arkeologiaĵoj, riĉaj kolektoj de judaĵoj kaj de moderna arto. Ateston pri la teruraĵoj de la juda kataklismo dum la dua mondmilito, la holokaŭsto, ni trovas en la nepre vizitinda muzeo-memorigejo Jad Vaŝem.

El cent landoj en unu ŝtaton


Tamen, oni ne rajtas subtaksi la grandegan atingon kunigi tiom multe da judoj, venintaj el 100 landoj, en la junan ŝtaton. Mi dubas ĉu ekzistas paralelaĵo por tiu ĉi fenomeno, la ensorbado de milionoj da novaj enmigrintoj fare de relative malmultaj loĝantoj. Aliaj grandaj atingoj estas la kreo de forta ekonomio, de mondfama armea potenco, evoluinta jura sistemo kaj de tre alta ĝenerala vivnivelo: ĉio ĉi ene de kelkaj jardekoj! Nepre menciindas la konservigo de la demokrata regadsistemo: malgraŭ la centra loko kiun okupas en nia vivo la temoj militaj kaj sekurecaj, neniam aperis minaco por la pludaŭro de demokratio.

Rilate la problemojn de sekureco kaj malpaco, mi opinias ke ni, israelanoj, tamen faris grandajn paŝojn ĉi-kampe de post 1948, kiam la judoj en Israelo militis kontraŭ ĉiuj ŝtatoj ĉirkaŭaj plus niaj samlandanoj, la palestinanoj.

La promeso de Jesaja

Vere, ankoraŭ ne venis plena paco al nia regiono. Militismo kaj terorismo regas ĉe la bordo de Mediteraneo, kaj ankoraŭ ne plenumiĝis la promesoj de la profeto Jesaja (hebree: Jeŝaajahu): "Kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon". Sed grandega progreso ja okazis: post kelkaj militoj la israela ŝtato starigis pacon kun du el la kvar najbaraj arabaj ŝtatoj; krome, kun la palestinanoj ni faris eble duonon de la vojo por akiri plenan pacigon: mi kredas ke, malgraŭ la obstakloj, fine venos la bona solvo.

El la rulaĵoj de la Morta Maro



Bazaro en Jerusalemo

Morta Maro, viviga kaj saniga

La nomo povas erarigi: la regiono de la Morta Maro fakte plenas de vivo.

Kio alia ol vivo estas la mineralriĉa akvo, kies surfaco situas 400 metrojn sub la mar-nivelo? Kio alia, la varmakvaj fontoj resanigaj kaj la fama nigra koto, bona por flegado? Vivigas tie la sunradioj, brilantaj pli ol 330 tagojn jare, kaj vivigas la aero enspirata.

Apud ĉiuj siaj resanigaj kvalitoj, la regiono proponas eblojn de aventuro, malkovro, turismado kaj ripozo, ĝuadon de la naturaj donacoj kaj de la trezoroj de pasinteco, en kondiĉoj de ĉiamaj printempo aŭ somero (de 20° en januaro ĝis 39° en julio).

Ĉiu ekskurso al Israelo devus inkludi viziton al la Morta Maro, la plej malalta loko en la mondo, je duhora distanco aŭte aŭ buse el Tel-Avivo, unuhora el Jerusalemo.

La kvalitoj de la regiono rilate plibeligon estis konataj jam en la tempo de Kleopatra. Arkeologoj malkovris restaĵojn de kosmetika entrepreno, kiu laŭtate ŝin servis. Hodiaŭ denove, kosmetikaĵoj kaj produktoj por vizaĝ-flegado estas eksportataj de ĉi tie, bazitaj sur elakvaj mineraloj kaj materialoj de la dezerta vegetaĵaro. Vi povas aĉeti ilin en via lando, sed pli valoras sperti la originalon...



Trankvile flosi sur salriĉa akvo...

Laŭlonge de la bordoj de la Morta Maro abundas kuracaj akvofontoj diversaj, de simplastilaj ĝis plej luksaj kaj prestiĝaj. Eĉ dum unutaga ekskurso restas ĉiam tempo por flosi sur la marakvo kaj ŝpruci sur sin la unikan nigran koton.

Oni kuracas ĉi tie suferantojn je diversaj malsanoj de haŭto, kiel psoriazo, kaj de la artikoj, kiel inflamoj kaj reŭmatismo. La kuracaj kvalitoj de la maro kaj de la koto fontas el alta koncentriĝo de mineraloj kaj saloj, kiuj venas el subteraj varmaj akvofontoj kaj el la enfluanta rivero Jordano. La preskaŭ eterna sunbrilo kaj la dezerta ĉirkaŭaĵo kontribuas al rapida elvaporigo de la akvo, tiel kreskigante la koncentriĝon de oksigeno kaj bromo en la aero, kio helpas kuraci certajn alergiojn. Malsanuloj el la tuta mondo, precipe psoriazuloj, venas por kuraciĝi dum minimume dek tagoj.

Sed eĉ sen atenti terapiojn, apenaŭ ekzistas plibeligaj, eĉ dorlotaj flegadoj kiujn vi ne trovos ĉi tie. Sunbruniĝu plezure, ne timante brulvundojn. Sereniĝu en la mineraloza akvo de la maro aŭ de la termobasenoj. Ĝuu la kotajn banojn kaj kotŝmiradon, kiuj igos vian haŭton glata.

Turisme, la plej impresa vidindaĵo estas la surmonta palaco kaj fortreso Masada, atingebla per telfero. Konstruita de la reĝo Herodo dum la romia regado, ĝi havas tre interesan, tragikan historion de heroeco de la sieĝitaj ribelantoj judaj. Jam pro la spirhaltiga panoramo de supre vidata valoras ĝin viziti.



Ĉe la Murego de Lamentoj

Fotografita de israelaj turistaj restadecoj

Sube de Masada troviĝas tre gravaj arkeologiaj elfosaĵoj: Kumran, en kies kavernoj loĝis antaŭ du jarmiloj, laŭ tre strikta religia vivmaniero, la esenoj, membroj de juda sekto. Tie oni malkovris en 1947 la mondfamajn "rulaĵojn de la Morta Maro".

Diversaj ekskursoj kondukas la turistojn al la monto Sodomo, al kavernoj kaj fontoj, naturrezervejoj, arkeologiejoj, dezertaj pejzaĝoj kun rokaro, senakvaj riveroj, pejzaĝoj kaj etoso kiuj elvokas bildojn de la Biblio.



... kaj ĝui
kotŝmiron
apartenas...

Kaj fine: kial fakte oni
nomas la Mortan Maron
tiel?

Ĉar la alta kvanto de la
saloj kaj mineraloj en ĝi
malebligas ĉiun animalan
vicon. Fakte, en la hebrea
ĝi nomiĝas Jam Hamelaĥ,
"Maro de la Salo."



... al la
plezuroj ĉe
la Morta
Maro.

Multaj atingoj, sed ankaŭ ne malmultaj seniluziigoj. La fondintoj antaŭvidis ŝtaton kun modela socio: sociala justeco, bonaj kaj moralaj rilatoj inter la homoj, paco kaj toleremo inter ortodoksuloj kaj liberpensuloj, foresto de grandaj ekonomiaj diferencoj inter la diversaj tavoloj de la socio.

Fiero malgraŭ ombroj

Sed la ekonomiaj diferencoj restis. Eĉ, el idealisma socio ni fariĝis materialisma anaro, kiel en la ceteraj modernaj ŝtatoj de nia mondo. La individuismo pli kaj pli superregas. Parto de tiuj naskitaj en Israelo elmigras eksterlanden, direkte al ekonomia prospero (komputilisto en Kalifornio ja gajnas pli ol en Tel-Avivo...). La glora fenomeno de kibucoj (kolektivaj loĝkomunumoj), tiel famiĝinta kaj simbolinta la reciprokan helpon, propran laboron kaj idealisman cionismon, tiu ĉi kvazaŭ perfekta apliko de la teorio de socialismo, nuntempe kolapsas.

Sed ĉi tiuj ombroj ne devas ŝanĝi nigra la ĝeneralan bildon de la akiritaj sukcesoj kaj atingoj. La ekzisto de grandaj makuloj kaj sulkoj ne signifas ke la "juna" ŝtato, kiu fariĝis jam "mezaĝa", perdis entute sian bonan esencon.

Se ni retrorigardas laŭ vasta skalo, komparante kion ni havas nun kaj kion ni havis nur antaŭ kelkaj jardekoj, ni povas esti fieraj. Io grandioza ja okazis en nia lando dum tiuj jaroj. Multaj nomas ĝin miraklo. Ni fieru pri tiu ĉi miraklo, kaj samtempe strebu por pli bona socio, aspiru al pli pozitivaj procezoj, senĉese agu por akiri la tiel deziratan plenan pacon kun ĉiuj niaj najbaroj, kaj ni protektu la demokratecon kaj firmecon de nia jam-ne-tiel-juna ŝtato. ★

Daŭrigo de p. 22

Ŝtatojn de arkitekturo ne lasos indiferenta ke Tel-Avivon oni konsideras kiel la tutmondan ĉefurbon de la stilo Bauhaus, kiu furoris ĉi tie en la 30-aj jaroj. Multaj perloj de Bauhaus bone konserviĝis.

Viziton postulas ankaŭ multaj muzeoj, kelkaj unikaj, kiel la Muzeo de Diasporo, prezentanta la historion de dumil jaroj da juda disvivado. Apude situas la Muzeo Erec-Israel, pri la historio kaj arkeologio de la regiono, konstruita ĉirkaŭ aktiva arkeologia elfosejo de la antikva urbo Tel Kasila. La Tel-Aviva Muzeo de Arto, fondita en 1971, prezentas modernajn israelajn pentraĵojn kaj internacian arton, kaj abunde gastigas kulturajn eventojn.

Fine, malmankas la okazoj distri sin per teatraĵoj kaj diversaj podiartoj. La Filharmonia Orkestro de Tel-Avivo kun sia fama dirigento Zubin Mehta akiris mondan renomon.

Por la kongresa valizo

Antologio de la hebrea poezio. Komp. kaj trad. J. Kohen-Cedek. 268p. 24cm. € 21,00.

Esperanto-hebrea vortaro. H. Mašler, J. Murĵan. 28p. 25cm. € 5,70.

La gimnazio. Ŝalom Aleĥem. Trad. L. L. Zamenhof. 102p. 18cm. Dulingva: E-japana. Humura monologo. € 6,30.

Ili vivis sur la tero. M. kaj B. Robineau. 251p. 24cm. Mondvojaĝo. Kun ĉapitro pri la kibuco vivo. € 22,50.

Kanto de kantoj. Trad. A. Cherpillod. 128p. 21cm. Dulingva. € 13,80.

Kantu ja Cion. Nuntempaj E-poemoj el Israelo. € 7,50.

Nova praktika vortaro hebrea-esperanta. J. Murĵan. 160p. 13cm. € 9,00.

Zamenhof kaj judismo. A. Cherpillod. 61p. 21cm. € 7,80.

Israelo ne ĉesas kanti. Kasedo de Tova Ben-Cvi. 19 kantoj + tekstoj. € 9,50.



85-a Universala Kongreso de Esperanto

Tel-Avivo, 25 julio – 1 aŭgusto 2000

Datoj

La UK daŭros de mardo, 25 julio (inaŭguro: 26 julio), ĝis mardo, 1 aŭg. 2000. Ekskursa tago: sabato, 29 julio.

Dua Bulteno

Aperinta fine de januaro, ĝi survojas al la kongresaj aliĝintoj, kun riĉa kaj varia oferto de hoteloj kaj gastejoj, ekskursoj, antaŭ- kaj postkongresoj.

Oficiala Antaŭkongreso

Sub la alta aŭspicio de lia moŝto prof. Faisal O. Al-Refou'h, ministro pri kulturo de Jordanio, la antaŭkongreso (22-25 julio) konsistos el du semi-

narioj kaj riĉa turisma programo:

— Seminario “Esperanto en la arabaj landoj” en Jordanio (Amano, 22-23 jul. en la Reĝa Palaco de Kulturo, 24 jul. en la hotelo Le Méridien). Temas pri la unua oficiala kunveno de arabaj e-istoj en la lastaj jardekoj; ili estas varme invitataj partopreni. Prelegos profesoroj Al-Refou'h, Tonkin k.a.

— Seminario “Paco kaj kunekzisto” (25 jul.), organizata de Lernejo pri Paco en la vilaĝo Neve Shalom / Wahat-el-Salam, Israelo (“Pac-oazo”, kun miksa loĝantaro juda-araba, kiu specialigas pri problemoj de paco kaj kunvivado en la Meza Oriento; <http://nswas.com/>).

— Kvartaga ekskurso en Jordanio kaj Israelo, kun eblo partopreni en unu aŭ ambaŭ seminarioj.

La aranĝo en Pac-oazo estas malfermita al ĉiuj kongresanoj. Oni organizas veturigo de la kongresejo al Pac-oazo kaj reen.

Antaŭ- kaj post-kongresoj

Antaŭ kaj post la UK:

Rondvojaĝo tra Israelo konatigas kun la “plejoj” de tiu ĉi eksterordinare interesa lando en ses tagoj: perfekta aranĝo por ĉiu kiu volas vidi la nepran esencon en mallonga tempo. Estas tuŝataj ĉiuj plej vizitindaj lokoj: Morta Maro, Jerusalemo, Jordana Valo, Galileo, Nazareto, Betlehemo, Hajfo, Akko ktp.

Nordo de Israelo en du tagoj vizitigas Nazareton, Galileon, Akkon, Hajfon kaj aliajn gravajn lokojn en la nordo. Tre rekomendinda por kongresanoj kiuj ŝparas tempon kaj monon.

Dumkongrese:

Tuttagaj ekskursoj, plurfoje dum la semajno, kompletigas la bildon de la lando: ili gvidos al Jerusalemo kaj la Morta Maro, kaj sabate (la ekskursita tago!) al la ĉirkaŭaĵo de Tel-Avivo kaj pluraj aliaj lokoj.

Postkongrese:

Jordanio: programo simila al tiu de la Oficiala Antaŭkongreso, sed sen la seminarioj partoj. Aparte moderpreza, ĝinda konatiĝo kun la lando.

TTT

Kompleta superrigardo pri la evento, tekstoj de la Dua Bulteno, detaloj pri la infana kongreseto: www.geocities.com/CollegePark/Bookstore/6270 kaj www.esperanto.org/uk2000.

Kotizoj

Ĝis la fino de marto (aliĝdato estas la alvendo de la pago), en eŭroj: individua membro de UEA (IM): 138 [landoj kun tarifo B: 103]; ne-IM 172 [130]; IM junulo/kunulo/handikapulo/komitatano: 69 [52]; samaj kategorioj ĉe ne-IM: 103 [78].

Ĝis la 20-a de januaro aliĝis 685 kongresanoj el 47 landoj. Krom israelanoj plej multnombraj aliĝintoj el Germanio (76), Japanio (71), Pollando (55), Francio (49), Nederlando (45) kaj Italio (27).

20-jara IF festis kun rekordo

Jouko Lindstedt · Finnlando

Internacia Festivalo, fama E-renkontiĝo precipe por familioj kaj mezaĝuloj, kolektis la rekordan nombron de 202 diverslandaj aliĝintoj en la germana urbo Münster (27 dec. - 3 jan.).

Ĉi-jarŝanĝe pasis 20 jaroj de post la unua IF, kiu origine naskiĝis kiel aranĝo paralela kun la renomaj Internaciaj Seminarioj de Germana E-Junularo, sed baldaŭ memstariĝis kiel tradicia renkontiĝo por ĉiuj ne plu tute junaj. Multaj el la partoprenantoj revenas al IF jaron post jaro.

La kadra temo de ĉi tiu 16-a IF estis "Eŭro-po": prelegoj prezentis diversajn ("po-ajn") alirojn ekonomiajn, kulturajn, politikajn kaj ide-historiajn al la eŭropa unuiĝado. Danke al la propra subtena fonduso de IF, povis partopreni ankaŭ pluraj esperantistoj el ekster Eŭropa Unio, precipe el Rusujo.

La semajno enhavis multajn kulturajn programerojn (inter kiuj elstaris la koncerto de la kantgrupo Akordo), kursojn kaj ekskursojn, tablotenisan turniron, romantikan dancejon kaj diskodancejon, kaj apartan infanan programon. Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino aranĝis studsesion dum la semajno.

Impresas "la varma kaj facila etoso" de IF.



La kulmino estis kompreneble la Silvestra Balo, dum kiu la partoprenantoj akceptis la novan 2000-an jaron per ĝojaj tostoĵoj kaj gaja dancado. Sed la vervo ne elĉerpiĝis per tio, ĉar ankaŭ la sekvaj vesperoj (is-

raela kaj internacia) enhavis spektindajn programerojn.

Kiel unuafojaj partoprenantoj, nia familio (ni gepatroj kaj du malgrandaj infanoj) estis impresita de la varma kaj facila etoso de la festivalo: neniuj rigardis la multajn ĉeestantajn infanojn kiel ĝenon, kaj la tradicia E-bierejo "Knaĵo" iĝis la ŝatata babilejo de

partoprenantoj plej diversaĝaj, en plej diversaj horoj de la tagnokto.

La 17-a IF okazos ĉirkaŭ la jarŝanĝo 2000/01 en Trier. Informoj riceveblas de Hans-Dieter Platz, Pf. 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanujo. ★

ESTONTA IIK JAM VIRTUALA SUKCESO

Monatojn antaŭ sia okazigo, Internacia Infana Kongreseto (IIK) 2000 jam viglas — en la Tut-Tera Teksaĵo.

Eble neniam antaŭe oni povis tiel detale informiĝi pri IIK kiel ĉi-jare, dank' al la riĉa UK-paĝaro atingebla je <http://www.esperanto.org/uk2000> aŭ je <http://www.geocities.com/CollegePark/Bookstore/6270>. (Vidu an-

kaŭ nov. '99, p. 188.) Ni legas en la paĝaro:

IIK estas unusemajna feria kunveno por infanoj inter 6 kaj 13 jaroj, kiuj flue parolas

Esperanton. La kongreseto okazadis ĉiujare tra la lastaj 30 jaroj, tipe paralele kun la UK. Ĝi altiras kutime inter 25 kaj 40 infanojn, kio signifas ke eblas konservi familiecan etoson. La programo inkluzivas vastan gamon da aktivajoj. La organiza teamo estas internacia kaj ampleksas minimume unu gvidanton por po kvin infanoj. Neniuj tradu-

kistoj necesas; la infanoj komunikas rekte en Esperanto. Efektive, multaj infanoj el diversaj landoj starigis firmajn amikecojn.



La ejo de la ĉi-jara IIK

Ankaŭ en 2000 la IIK okazos samtempe kun la UK (vidu p. 26), en la 40-hektara junulara vilaĝo Hadassim je 30 km nord-oriente de Tel-Avivo, apud Netanja, nur 12 km for de la maro. Hadassim estos ideala kongresejo: la tereno enhavas 13 viv-domojn, lernejon kun 65 klasoj kaj la necesajn servodomojn. Troviĝas kuirejo, granda manĝejo, lavejo, biblioteko, aŭditorio, amfiteatro, sportejoj, komputilejo funkcia ĝis malfrue kaj, nature, sanservoj.

Buso transportos la infanojn kaj la gvidantojn de la kongresejo la 25-an kaj en la lasta tagore en. Unu dumkongresa vizito estas planata kadre de tuttaga ekskurso al Tel-Avivo, kaj kroma vizito al la akvoparko Ŝfajim. La programo detaliĝos kiam estos sciataj la aĝoj kaj intereso de la partoprenantoj: ne mankos desegnado, modelkonstruado, ŝkeĉado, rol-ludado, verkado kaj rakontado.



Antaŭ fotoj komplezo de Henriko O. Ogúnyne

La diskuton vigligis Jean Codjo, kiu proponis ke afrikanoj mem zorgu pri la movado afrika laborante por la afrika komisiono, kaj kandidatiĝis por labori en ĝi. GBEGLO Koffi montris ke tio jam okazas kaj nun devas plivastiĝi.

Inter la partoprenantoj, starantaj:
GBEGLO Koffi (unua de maldekstre) kaj
AFANTCHAO-BIAKOU Yao (dua de dekstre).

Ĉu eko de EKOA?

Nomante la 7-an Togolandan Kongreson (28-31 dec., Aného) la 1-a EKOA (E-Kongreso Okcident-Afrika), oni tute ne erarus – opinias GBEGLO Koffi.


De 22 ĝis 31 decembro la Esperantujo togolanda vibris pro aranĝoj: kurso, ekzameno, interkonsiliĝo kaj kongreso, ĉiuj internaciaj.

La 22-an de decembro alvenis unu esperantisto el Burino, du el Ganao, kvar el Niĝerio kaj du el Ebury Bordo.

De la 23-a ĝis la 26-a okazis ĉiutaga kurso, preskaŭ seninterrompe inter 7.30 kaj 15.00: AFANTCHAO-BIAKOU Yao, ATTIOGBE-AGBEMADON B. Mensah, GBEGLO Koffi kaj SAGBADJELOU Kokou lecionis gramatike, konversacie kaj E-historie. La 26-an 13 kandidatoj en Lomé kaj 4 en Aného komencis la ekzamenon per antaŭtesto; la postan tagon 5 resp. 2 daŭrigis per la partoj skriba kaj parola.

Vespere oni veturis al Aného, urbo kun ĉ. 200 mil loĝantoj, 45 km-ojn for de Lomé, ĉe la landlimo kun Benino. Aného jam gastigis la 1-an Togolandan E-kongreson antaŭ 9 jaroj; multaj aktivuloj devenas el ĝi kaj ĝia regiono. Ĉi tie okazis, la 28-an de dec., interkonsiliĝo, kun ĉeesto de 28 kunvenantoj, inter kiuj ok beninanoj, unu ganaano kaj unu niĝeriano.

Sur la tagordo staris: 1. strukturo kaj gvidado de kluboj kaj landaj asocioj; 2. E-instruado en Afriko; 3. ekzamenoj; 4. informado kaj eksteraj rilatoj; 5. ceteraĵoj.



Henriko O. Ogúnyne (dekstre) ĉe la familio Sackey

Kristnaskaj vizitoj

Maloŭte ni en Niĝerio havas okazon kunveni pro la grandeco de nia lando kaj pro manko de mono. Des pli utile estis partopreni komunan seminarion en la togolandaj urboj Lomé kaj Aného, organizitan de la loka ILEI-sekcio, kiu celis trejni kursgvidantojn kaj ekzamenantojn por aliaj afrikaj landoj. Ni esploris diversajn materialojn kaj lernilojn; oni konsilis al ni uzi la Zagreban metodon. Mi lernis multon interesan kaj helpan al mia instruado hejme, pri gramatiko, kursgvidado kaj eĉ historio: mi malkovris mirigite ke Esperanto atingis Togolandon jam en 1933.

Tamen, mi ne plu volis sidi en la kursejo dum la Kristnaska festo; mi vojaĝis du Ganaon por revidi geamikojn laste viditajn okaze de la Tria Afrika Kongreso (1994) kaj kondolence viziti la vidvinon de Cameron Sackey, pioniro de la ganaa movado. [Vidu jun. '99, p. 120.] Helpe de telefonnumeroj el Pasporta Servo, mi povis kontakti miajn malnovajn korespond-amikojn Isaac Quartey (nun pastro), Lawrence kaj Benjamin Commey. Per la aŭto de Benjamin, ni veturis 40 km-ojn al Korkordzor. Ni vizitis la vidvinon Mary, kiu vivas tie kun la tri filoj: Cameron, Hans (nomita laŭ Hans Bakker) kaj bebo 16-monata. Emociplene, kun freŝaj rememoroj mi devis baldaŭ forlasi la familion por reveturi al la kongreso en Togolando, sed mi promesis reviziti ilin dum venontaj ferioj.

Henriko O. Ogúnyne · Niĝerio



Vi estas kore invitataj al la

1-a Nacia Esperanto-kongreso de Malagasa Esperanto-Unuiĝo
de la 18-a ĝis la 20-a de julio 2000 en Antananarivo.

Konstanta kongresa adreso: S-ino Justine Ralalarisoa, Lot. II.C.72-FD Manjakaray, MQ-101 Antananarivo, Malagasio

Pri instruado prelegis GBEGLO Koffi, kiu proponis ke ĝi havu tri gradojn en Afriko, respondajn al la ekzamenoj de la Zagreba Metodo, respektive al la elementa kaj meza niveloj de la internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.

Sub la punkto “ceteraĵoj” viciĝis pluraj tre gravaj temoj:

- afrikanoj kiuj havas laboreton, klopodu membriĝi mem al UEA, tiel ke la helpo de Fondaĵo Canuto iru al afrikanoj senlaboraj.

- ILEI havu rajtigitajn ekzamenantojn tra Afriko.

- problemoj pri retadreso: pro la alta kosto de ret-servoj, oni atentis ne tuj uzi retadreson de afrikano ĉiel ajn (ekz. en dissendo-listoj), sed nur post ties permeso.

Ĉiuj delegitoj eksterlandaj ricevis lernilojn por gvidi kursojn trinivelajn kaj ekzamen(i)g, dokumenton pri la deklaro de Berlino por la glata funkciado de la afrika movado, kaj tekstojn pri la tagordaj punktoj 1-3. Promesante ion provi en siaj landoj, ili invitis togolandojn por organizi kursojn kaj ekzamenojn ĉe ili.

Grava paŝo por Okcidenta Afriko

Kiu nomus la sepan Togolandan kongreson la unua EKO (Esperanto-Kongreso Okcident-Afrika), tiu tute ne erarus. Inter la 108 kongresanoj estis ja du eurbordaj, tri ganaaj, kvin niĝeriaj kaj naŭ beninaj; ili restis preskaŭ ĉiuj ĝis la fino, por spertiĝi pri la organizado de tia aranĝo. Komitat-kunsidoj, prelego pri la kongresa temo “Esperanto kaj la mediprotektado”, kultura vespero, kvizo, futbal-matĉo, meza ekzameno de UEA/ILEI, kongresa balo estis la ĉefaj programeroj. Unuafoje okazis ke registara reprezentanto — regiona prefekto — malfermis E-kongreson nacia. La aranĝojn partoprenis la loka Radio Delta Santé (vidu dec. ‘99, p. 221), kaj ĉeestis reprezentanto de la nacia radio-stacio.

Ĉi tiuj aranĝoj estas grava paŝo por la movado afrika. Esperantistoj el pluraj landoj kunvenis por paroli pri la afrika agado kaj starigis komunan planon pri la organizado de la landa movado kaj pri E-instruado. Esperindas ke ĉiuj esperantistoj kiuj partoprenis la aranĝojn en Togolando, povos ĉerpi ion por plu labori por sia movado.

Laŭ raporto de GBEGLO Koffi · Togolando

NAVIGE TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la
inform-oceano de Tut-Tera
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



ARANĜOJ

Kultura E-Festivalo 2000 (17-23 julio, Helsinko, Finnlando), kun parade riĉa prezentaro en ĉiaj kulturbranĉoj: <http://www.esperanto.fi/kef2000.html>
Seminario pri Interreto kaj ĝiaj teknikoj (16-22 apr., Stokholmo): <http://w1.871.telio.com/~u87101714/echei/>

LANDOJ, REGIONOJ

Kolombia E-Ligo (ĉefe hispanlingva) kun sia revuo *Andaj Ondo*: <http://www.geocities.com/kolombio/> kaj dulingva paĝo pri “La Internacia Lingvo, el Kolombio”: <http://esperanto-kolombio.org/>

Bogota E-ista Junulara Asocio fieras pri <http://www.geocities.com/bejabogota/>
Meksika E-Federacio, bele aranĝita, ofte freŝigata: <http://punto-y-aparte.com/esperanto/>

La retejo de Sveda E-Federacio ricevis 905 258 vizitojn en 1999, 64% pli ol en 1998. Troveblas tie i.a. Kiosko, internacia registro de rete legeblaj gazetoj, senpaga E-kurso kaj la reta informilo *NUN*, ankaŭ abonebla: <http://www.esperanto.se/>

LITERATURO, TEKSTOJ

Sabe Ud. Esperanto?, lernolibro de Jorge Hess por hispanparolantoj, zorge de Argentina E-Ligo: http://www.geocities.com/sue_hess/

Verkoj de Claude Piron angle kaj france: http://www.geocities.com/c_piron/
Universitata tezo (1997) de Nikola Markarian: “La batalo kontraŭ Babelturo: Kia estonteco por Esperanto en Francio kaj en la institucioj de EU?” (kompleta teksto anglalingva): <http://www.geocities.com/Athens/Aegean/6839/>

MUZIKO

Sep esperantistaj muzikistoj aŭ muzikgrupoj prezentiĝas (portugale, sed kun pluraj kantoj deŝuteblaj en MP3-formato) ĉe <http://www.musicexpress.com.br/>

REVUOJ, BULTENOJ

Ĉina bulteno *Agadu!*, kun pensigaj tekstoj pri nia movado: <http://209.185.12.35/writers/sauxkio/>

Esperanto sub la Suda Kruco (Aŭstralio / Nov-Zelando) en nova loko: <http://www.geocities.com/Athens/Olympus/6878/esk-l3.htm>

Kajeroj el la Sudo (Hispanio): <http://esperanto.dragonfire.net/k45.htm>

SERVO

Koresponda Servo Mondskala: <http://perso.libertysurf.fr/kosomo/>

SOLIDARECO

La MalsatTTTejo (“The Hunger Site”), kiun ni menciis en januaro, havas nun tradukojn de “Faktoj pri malsato” en 57 lingvoj, i.a. en Esperanto: <http://www.thehungersite.com/>

CETERO

Aŭtofrakasistoj, kvinlingva informilo de la eŭropa movado kontraŭ aŭtomobiloj, kun senpaga abonebla retbulteno: <http://www.antenna.nl/eyfa/cb/>

GAZETARAJ KOMUNIKOJ HISPANE

Kunlabore de Vincent Charlot, Kalle Kniivilä kaj Alberto Fumero, la gazetaraj komunikoj de UEA ekaperas en la hispana. Dezirantoj ricevi ilin sendu sentekstan mesaĝon al esperanto-noticias-subscribe@egroups.com.

BONA JARO POR KSM

Koresponda Servo Mondskala de UEA ricevis 428 korespondpetojn en 1999: t.e. 9 petojn pli ol en 1998.

Plimultiĝis petoj i.a. en Francio (de 70 al 96), Rusio (de 38 al 56) kaj Ebura Bordo (de 1 al 12), kaj malkreskis ekz. en Brazilo (de 59 al 39) kaj Irano (de 22 al 8). Tamen, tiaj ŝanĝoj tre dependas de hazardo.

Foje oni, ekz. landaj asocioj, provas starigi propran korespond-servon. Malkonsilinde, ĉar malgranda servo ne povas oferti same vastan elekton kiel KSM, nek ĉi ties pro-spartan kompetenton. Por optimume uzi la limigitajn rimedojn de la E-movado, estas plej prudente utiligi kaj diskonigi la servojn de KSM.

De 1990 KSM estas prizorgata de François-Xavier Gilbert (B. P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio). Informiĝu / aliĝu kontraŭ unu respondkupono, petu adresojn de korespondemuloj kontraŭ du rk. (sendante detalajn indikojn pri vi kaj pri la dezirataj korespondantoj).

HONKONGO INVITAS AL IJK

Lernu pri la ĉinaj lingvo, kaligrafio, papertranĉado, nudeloj, pastobuloj... kleriĝu pri Honkongo, tradiciaj festoj ĉinaj kaj kultura tutmondiĝo... flugpilku kaj ŝnur-saltu... diskutu pri la E-movado kaj TEJO en la 56-a IJK (5-12 aŭg., Honkongo, Ĉinio). Konsultu <http://www.esperanto.org/ijk2000>; skribu al la LKK: P. O. K. 77, CN-100037 Beijing; cel@china-report.com, aŭ Honkonga Junulara E-Asocio, P.O. B. 92153, T.S.T. Post Office, Kowloon, Honkongo; billmak@ibm.net.

KOTIZTABELO DE UEA POR 2000

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	34	85	51	31	170
Aŭstrio/eŭro	7,63	19,26	47,96	30,52	18,17	95,93
Aŭstrio/ŝilingo	105	265	660	420	250	1320
Belgio/eŭro	7,68	19,21	48,09	30,61	18,34	96,18
Belgio/franko	310	775	1940	1235	740	3880
Britio/pundo	5	14	34	21	13	68
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	630	380	2100
Danio/krono	55	140	355	230	135	710
Finnlando/eŭro	7,57	19,34	47,93	30,27	18,50	95,87
Finnlando/marko	45	115	285	180	110	570
Francio/eŭro	7,62	19,06	48,02	30,49	18,29	96,04
Francio/franko	50	125	315	200	120	630
Germanio/eŭro	7,67	19,43	48,06	30,17	18,41	96,12
Germanio/marko	15	38	94	59	36	188
Greklando/drakmo	1700	4300	10700	6800	4100	21400
Hispanio/eŭro	6,61	16,23	40,87	25,84	15,63	81,74
Hispanio/peseto	1100	2700	6800	4300	2600	13600
Hungario/forinto	1100	2800	7100	4300	2600	14200
Irlando/eŭro	7,62	19,05	47,93	30,47	17,78	95,86
Irlando/pundo	6	15	37,75	24	14	75,50
Islando/eŭro	8	19	48	29	17	96
Israelo/eŭro	6	16	39	23	14	78
Italio/eŭro	7,75	19,11	48,03	30,47	18,59	96,06
Italio/liro	15000	37000	93000	59000	36000	186000
Japanio/eno	1000	2600	6500	3900	2300	13000
Kanado/dolaro	13	33	82	49	29	164
Nederlando/eŭro	8	19	48	31	18	96
Nederlando/guldeno	17,63	41,87	105,78	68,32	39,67	211,56
Norvegio/krono	65	165	415	250	150	830
Nov-Zelando/dolaro	16	40	100	60	36	200
Portugalio/eŭro	5,99	14,96	37,41	23,94	14,47	74,82
Portugalio/eskudo	1200	3000	7500	4800	2900	15000
Slovakio/krono	180	460	1150	690	410	2300
Svedio/krono	70	170	430	275	165	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	9	23	57	34	20	114
TARIFO A/eŭro	5	13	32	19	11	64
TARIFO B/eŭro	4	10	24	14	9	48

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio, San-Marino laŭ Italio, Liĥtenŝtejno laŭ Svislando.

TARIFO A: Honkongo, Korea Resp., Malto, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)

MA(-T): Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*

DM: Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

Reagoj



La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

Tutmonda malekvilibro

Rilate al tutmondiĝo (okt. '99, p. 162) mi trovis en la gazeto *Le Monde* (14 okt.) pripensindajn vortojn de prof. Michel Beaud, kiu verkis en 1997 la libron *Le Basculement du monde* ("La ŝanceliĝo de la mondo"):

"La respondoj de la liberalismo kaj tutmondiĝo ne ŝajnas taŭgi por la plimulto de la homaro, ĉar tiuj ekonomie malriĉaj (4/5 de la homaro) ne povas esti helpataj nur de la ekonomia merkato. Malriĉeco pezas sur ĉio (edukado, sano, informado. . .). Neniam ekzistis tia malekvilibro en la nivelo de disvolviĝo kaj tia dependiĝo de la malriĉuloj. La plej riĉaj 20% de la mondloĝantaro disponas pri 86% de la riĉfontoj, kontraŭ 70% antaŭ 30 jaroj, kaj la plej malriĉaj 20% nur pri 1%! (. . .) Krome, la plej riĉaj landoj (1 miliardo da homoj) ade inventas novajn bezonojn kaj konsummanierojn por respondi al siaj problemoj de senlaboreco, dum la ceteraj 5 miliardoj, eĉ tiuj kiuj vivas per 1 dolaro tage, kroĉas sin senespere al la revo veni sur la nivelon de la riĉuloj (. . .). Estonte Barato kaj Ĉinio kun siaj 2,2 miliardoj da homoj pli pezos (. . .) sur la mondaj decidoj. Tio implicos inventi jam nun novan ekvilibron dank' al nova sistemo de monda registaro".


Herman Deceuninck · Belgio

En malĝusta angulo

Mi legis (nov. '99, p. 201) ke fondiĝos la 15-an de dec. "Esperanto-partio" en Britio.

La partio celos "antaŭenigi Esperanton kaj la demokratiajn kaj homamajn valorojn ligitajn al ĝi".

Mi opinias ke tiuj adeptoj nur malantaŭenigos Esperanton. La pasinteco montras ke ĉiuj partioj kiuj



strebis al limigita celo estas kondamnitaj al malapero. Aliaj partioj konsideras ĝin kiel neseriozan, ĉar tia partio malhavas respondojn al la plej gravaj sociaj problemoj. La iniciatantoj manovras Esperanton en malĝustan angulon. Estas cetere malaprobinde ke neparolantoj de Esperanto ricevos tiel la impreson ke esperantistoj kredas la "demokratiajn kaj homamajn valorojn" ligitaj sole al Esperanto — sed ĉi tiuj valoroj ja ne dependas de (aŭ estas ligitaj al) iu ajn lingvo!

Estus pli bone se la iniciatantoj kaj adeptoj de la "Esperanto-partio" aktivus en la jam ekzistantaj partioj, ekz. diskutante kun politikistoj, edukistoj ktp pri la lingvo-problemo kaj elblaj solvoj.

Hans Erasmus · Nederlando

Red.: La partio intertempe estis fondita, vidu "Anoncetoj", p. 37.

Kontaktoj ne nur kongresaj

"La plimulto de la 160 japanaj partoprenantoj ĉefe turismis kaj butikumis, ĉiam krokodilante, sen intereso pri la seriozaj diskutoj en salonoj" (nov. '99, p. 182-183). Ne diru tiel, d-ro Yamasaki. Estis diversaj manieroj partopreni en la Dua Azia Kongreso. Mi aliĝis al 4 duontagaj ekskursoj kaj amikiĝis kun multaj gejunuloj, kiuj nomis sin ne organizantoj sed helpantoj. Poste mi tion bone komprenis, ĉar mi ne povas trovi iliajn nomojn en la kongresa libro. Eble la kotizo estis multekosta por studentoj. Mi sendis fotojn al ili kaj jam komencas korespondadon. Tiamaniere, mi kredas, mi povas instigi "la aktivecon de loka movado".

Tsuda Masao · Japanio

Pinglon, skarpon, T-ĉemizon

Frato B. Goerner (nov. '99, p. 192) alvokas porti Esperanto-insignon. Li memorigas pri Ivo Lapenna, kiu kritikadis la portadon de verdaj steloj. Tamen, se mi bone memoras, Lapenna diris: "ne multaj,

sed unu". Tiun unu insignon oni ja surhavu. Mi konsilus eĉ pli: en medio kie oni kutimas montri membrecon k.s. per deca pinglo, oni havu decan pinglon; kie oni kutimas indiki fervoron per okulfrapa T-ĉemizo, tie oni havu okulfrapan T-ĉemizon; kaj tie kie oni kutimas esprimi entuziasmon pri io per trikita skarpo, oni havu trikitan skarpon! En la Reto-Klubo de Esperanto-parolantaj infanoj (www.digicron.com/retoklubo) por triki tian skarpon cetere troviĝas ekzemploj...

Wouter F. Pilger · Nederlando

Juvela insigno

Frato B. Goerner pravas noble. Diskreta, ne tro okulfrapa insigno povas altiri atenton, sen ridindigaj efikoj. Tamen, mi povas rakonti amuzajon. Iam, en strato de Romo, mi vidis viron kun eta E-insigno sur la brusto. Mi alparolis lin entuziasme en Esperanto... kaj tiu sinjoro respondis al mi hispane... Li ne estis esperantisto, sed ŝatis tiun simbolon, kvazaŭ ĝi estus valora juvelo. Se nesamideanoj faras tion, kial ni ne faru la samon?


Carlo Sarandrea · Italio

LEGOLIBRO EL KANADO

LITO APUD LA FENESTRO.
Betty Salt (1907-1994).
Rotterdam: UEA, 1999. 111p.
Prezo: € 4,80.

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, kun kelkaj tradukoj el la kanada literaturo. Stile belaj, ili facile kaptas ankaŭ la malpli spertan leganton, dank' al relative facila lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco de la plej multaj tekstoj la libro bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.





Recenzoj


Ideoj

"Ne nur por pasigi la tempon"

Imitado de Kristo (1418). Thomas a Kempis (1379-1471). El la latina trad. G. F. De Ruyver. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1997. 165p. 21cm. € 12,90.

"**S**erĉu konvenan tempon por okupiĝi pri vi mem kaj ofte meditu la bonfarojn de Dio. Evitu kuriozaĵojn; legu pri temoj kiuj tuŝas vian koron, ne nur por pasigi la tempon. Se vi evitas superflujajn paroladojn kaj troajn iradojn kaj ne aŭskultas novaĵojn kaj babildojn, vi trovos sufiĉan kaj oportunan tempon por bonaj meditadoj."

Jen pli-malpli hazarda cito (Unua Libro, ĉap. 20) el unu el la plej famaj verketoj el Nederlando, kiun Thomas a Kempis verkis en la tiutempe internacia lingvo latina. Eble iom strange: la tri translime plej famaj nederlandaj aŭtoroj verkis ne en la nacia lingvo. La multflanka erudiciulo, pacisto kaj



polemikisto Erasmo, la grandioza poeto Jano Sekundo, la saĝa, ofte inspira Thomas a Kempis: ili ĉiuj verkis latine. Ili inspiris multajn homojn en multaj landoj, de sia tempo ĝis hodiaŭ. Iom karakterize por nia lando: ni ofte ne prenas nian propran kulturan fonon tiel serioze ke ni kuraĝus eksporti ĝin sen kvazaŭ anticipa internaciigo. Eble tial nuntempe tiel furoras nialande la ideo ke ĉio estu anglalingva...

Thomas a Kempis devenis el religia noviga movado, la t.n. Moderna Devoteco, kiun iniciatis Geert Groote el Deventer (fine de la 14-a jc.). Ĝi estis movado revolucia — ne perforta, sed spirita revolucio, kiu celis ne la gravulojn, la grafojn kaj

baronojn, sed la ĝeneralan publikon, la normalajn homojn: ĝuste tiuj estu edukitaj por fariĝi aŭtentaj kristanoj. Religio ne estu ekstera akceptado de dogmo, sed interna ŝanĝiĝo. La Moderna Devoteco funde kredis ke edukado — ne nur elita, sed kiom eble plej ĝenerala — estas la sanigilo por la socio.

El tiu movado devenis kelkaj homoj vere valoraj; la plej konata rekta ido de iliaj lernejoj estas Erasmo. Ankaŭ religie ni heredis el tiu movado. La liberalaj kristanoj, remonstrantoj kaj aliaj, kutime kun granda danko citas la tiutempan klopodadon malfermi la mezepokan spiriton, kiel plej fruan provon je praktika kristanismo sen dogma balasto.

Fakte, funda esploro trovas ke multe el tio kion nuntempe (almenaŭ en Nederlando) ni konsideras plej normala — certa toleremo, certa mensa malfermiteco, certa modesteco koncerne la proprajn atingojn, certa timo antaŭ grandaj sloganoj kaj asertoj, certa prefero esti simplaj, sen-arogaj — iel devenas el la Moderna Devoteco... Do, jam nur por honori niajn praulojn kaj iom (ree) ekkoni niajn radikojn tiel forajn, indas (re)legi tiun ĉi modestan libreton.

Gerrit Berveling · Nederlando

Vojmontriloj por nova socio

Tolero al minoritatoj. Referaĵoj de la Internacia Simpozio. Red. Zlatko Tišljar kaj Alojz Širec. Parte tradukis, el la kroata kaj slovena, Zlatko Tišljar. Maribor: Inter-kulturo / IKEL, 1997. 141p. 21cm. € 7,80. **Eŭropa ideologio.** Zlatko Tišljar (1945). Maribor: Inter-kulturo, 1998. 68p. 17cm. € 7,50.

Tolero... konsistas el referaĵoj prezentitaj al simpozio en 1995, kiun partoprenis en Maribor 80 personoj el 26 landoj. La aŭtoroj (el Germanio, Irlando, Israelo, Italio, Jugoslavio, Kroatio kaj Slovenio) traktas gamon da temoj kiuj ampleksas diskriminacion kontraŭ minoritatoj; toleremon kaj egalrajtecon; la situaciojn de romaoj (ciganoj) kaj hungarlingvanoj en Slovenio, de serboj kaj mardaroj (hungaroj) en Vojvodino kaj de slovenoj en Italio; la palestinan problemon; sintenojn de kroatoj al aliuloj; politikon

kaj lingvon; identecon kaj kulturon; la Konsilion de Eŭropo kaj lingvojn de malplimultoj; kaj *subsidiarecon* (malcentrismo) en EU. Sekvas konkludoj kaj rekomendoj.

La referaĵoj estas iom malegalaj inter si laŭ longeco, kvalito kaj stilo. Malplej kontentigis min la plej longa, pri "ekzotika kompreno de aliuloj en Kroatio", de prof. V. Katunarić, parte pro mia persona antipatio al usondevenaj sociologiaj metodoj kaj jargono, parte pro la iom peza traktado de la temo. Parenteze, ĝi (same kiel aliaj

referaĵoj) enhavas kelkajn lingvajn malglatadojn kaj (kompost-?) erarojn: ekz. *primurdismo*, *elpezon*, *detojn*, *longitudinala*.

Kontraste, J. Murjan referas pri la palestina problemoj ja koncize, sed tro mallonge por tiom kompleksa temo.

Aparte pensinstiga estas "Lingvo, individua kaj grupa identeco kaj kulturo" de prof. dr. M. Križman.

Plurajn frazojn el diversaj referaĵoj mi trovas citindaj: "Ankaŭ demokratio diskriminacias etnajn minoritatojn." "La esperantistaro mem suferas malavantaĝojn pro sia lingva



La timo al malsimilo

Paĉjo, kio estas rasismo? (1997). Tahar Ben Jelloun (1944). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Rotterdam: UEA, 1999. 52p. 19cm. € 6,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Aperis bela libreto pri la komplika temo kio estas rasismo. La aŭtoro klopodis memori dumdemonstracian diskuton kun sia filino kaj verkis surbaze de tio tekston, kiu kompletigis post diskutoj kun amikinoj de la filino.

La libro estas bona pro diversaj kialoj. Unue, la aŭtoro ne ĝenerale insultas rasistojn, sed klopodas priskribi kial kelkaj homoj fariĝas rasistoj. Laŭ la aŭtoro rasismo dependas de tio ke rasisto estis edukita iĝi rasisma. Rasisto timas tiun kiu ne similas lin, interalie, pro antaŭjuĝoj. La aŭtoro ankaŭ rakontas ke liaj najbaroj en Francio timis lin kaj lian familion ĝis li invitis la najbarojn manĝi kuskuson. Kiam ili interparolis kaj kune ridis, ne plu estis malfido.

Due, la aŭtoro montras tendencon nek kontraŭ nek por iu popolo. Li kondamnas la nazian genocidon kontraŭ judoj, sed skribas ke ankaŭ judoj povas esti rasismaj. Li kritikas diskriminacion kontraŭ nigruloj en Usono kaj en sia hejmlando Maroko, sed ankaŭ




la genocidon en Ruando, pri kiu li parte donas kulpon al koloniismo. La libro ankaŭ traktas socikulturajn diferencojn, genetikon, heredon kaj klonadon, kaj ĝi konkludas ke ne religioj estas rasismaj sed “tio kion la homoj foje faras el ili”.

Trie, dekjarulo povas kompreni la enhavon, kaj plenkreskulo tamen povas legi ĝin kun intereso.

Kontraŭ unu opinio mi oponas. Tahar Ben Jelloun skribas (p. 17) ke raso ne ekzistas: “ekzistas nur unu raso, ni nomu ĝin la homa genro, aŭ homa specio”. Kompreneble, tio estas afero pri difinado. PIV donas kvar bonajn difinojn de “raso”, kaj samtempe avertas ke raso estas biologia nocio, ne lingva aŭ kultura. Mi subtenas PIV-on kontraŭ Ben Jelloun pri tiu ĉi difino. Diversaj rasoj ekzistas; pri tio mi ĝojas, same kiel mi ĝojas ke ekzistas diversaj floroj kaj ne nur unu.

La libro estas atesto pri varma diskuto inter patro kaj filino kaj samtempe klarigo pri multaj nocioj kiuj rilatas al rasismo. Ĝi konkludas ke lukto kontraŭ rasismo devas esti ĉiutaga reflekso. La originalo de la maroka Goncourt-laŭreato fariĝis furoraĵo en Francio. Aĉetu la libron. Legu ĝin. Diskutu ĝin en via Esperanto-klubo. Diskutu ĝin kun viaj infanoj kaj kun viaj amikoj.

Leif Nordenstorm · Svedio



minoritata stato.” “Logocido (ekstermo de iu lingvo) estas samtempe ankaŭ etnocido.” “La tendenco en EU estas iom post iom disvastigo kaj trudo al eŭropanoj la anglan lingvon.”

La verketo *Eŭropa ideologio* de Zlatko Tišljar impresas malgranda, sed enhavoriĉa — aŭ, kiel oni diras en la gaela, “tiom plena kiom ovo plenas de nutraĵo”. La aŭtoro — fondinto de Internacia Kultura Servo

kaj iniciatinto de Asocio por Eŭropa Konscio —, pro siaj travivaĵoj en disfalanta Jugoslavio kaj post diskutoj kun serbaj amikoj, sentis sin devigita repensi la ideologiajn valorojn lernitajn dum lia edukado. Tiuj valoroj, cetere pli-malpli komunaj en preskaŭ ĉiuj ŝtatoj kaj sociaj grupoj, estas influitaj de dikotomioj. Jen aksiomo de Tišljar: “... la ĝenerala homa konduto estas difinita de du inter si interplektitaj kaj samtempe aktivantaj softvaro: (...) egoismo kaj (...) altruismo (...) la rezulto estas amo kaj malamo (...) amo al la grupo kaj iom da malamo al aliaj grupoj”.

En faŝisma ŝtato oni estas instruita ami nur samŝtatanojn aŭ sampartianojn. En totalisma socio la individuo nenion valoras. La komunisma ŝtato donas prioritaton al la socio kaj malvalorigas la individuon. En tiu senco, komunismo estas “altruisma”. Kontraste, en demokratio laŭ la usona “egoisma” modelo, la libereco de

la individuo pli gravas ol la socio kaj la sociala respondeco. Tišljar deziras akordigi ambaŭ tendencojn kaj alvoki la novan Eŭropon al repensita ideologio.

Kiel kroato — do, eŭropano sed ano de ŝtato ankoraŭ ekster Eŭropa Unio — Tišljar povas observi, analizi kaj kritiki tiun union el la vidpunkto de informita eksterulo. Li rekonas ties esperigajn perspektivojn, sed samtempe ankaŭ la danĝerojn kiujn ĝi alfrontas, eĉ eblajn malsukcesojn kaj frakasigojn.

Li traktas rilatajn tiklajn temojn: identecon, lingvan malekvilibron (nun danĝere favoran al la potenca angla), bezonon de neŭtrala lingvo, sintezon de eŭropa lingva tradicio ktp.

Fine Tišljar prezentas la kompletan originalan Eŭropan Manifeston, kiu sendube meritus esti tradukita en ĉiujn gravajn naciajn lingvojn.

Garbhan MacAoidh · Irlando

Bunta bukedo el Brazilo

La manoj de Eŭridica (1949). Pedro Bloch (1914). Trad. Geraldo Mattos. 63p. € 6,30. **La horo kaj la vico de Aŭgusto Matraga** (1946). João Guimarães Rosa (1908-67). Trad. Leopoldo H. Knoedt. 63p. Ilus. € 9,30. **La alienisto** (1882). Machado de Assis (1839-1908). Trad. Paulo S. Viana. 95p. € 9,30. **Joĉjo Mulato / La maskoj** (1917). Menotti del Picchia (1892-1988). Trad. G. Mattos. 108p. Ilus. € 9,30. **Inocenta** (1872). Alfredo d'Escagnolle Taunay (1843-99). Trad. Geraldo Pádua. 237p. € 18,90. **Vivoj sekaj** (1938). Graciliano Ramos (1892-1953). Trad. L. H. Knoedt. 135p. Ilus. Aldemir Martins. € 18,90. *Ĉiuj*: Chapecó: Fonto, 1997. 21cm.

Jena manpleno da tradukoj ne nur reprezentas ĉiujn malsamajn ĝenrojn (romano, novelo, poemo kaj teatraĵo) en tuta gamo da stiloj (romantismo, realismo, modernismo ktp), sed ankaŭ donas multfacetan portreton de la tradicia brazila socio inter ĉ. 1850 kaj 1950. Antaŭ ol komenti ilin unuope, mi tial hastas rekomendi la tutan kolekton al literaturaj frandemuloj, samkiel al scivolemuloj pri interesa kulturo aŭ tutsimpe al ŝatantoj de bonegaj rakontoj.

La drame dinamikan monologon de Bloch protagonistas la sensukcesa verkisto Gumerindo, kiu sentas sin kaptita inter la ŝajnokulturo kaj teda mondumeco kultivataj de lia edzino Milda kaj la belaj manoj de la amatino Eŭridica. Kiel en la klasika tragedio al kiu aludas la titolo, temas pri omena konstelacio de morto, muziko kaj la ideo de disiĝo kaj reveno. La aŭtoro sukcesas krei suspenson ĝis la plej lasta paĝo, en kiu la elnodiĝo trafas nin kun pezo de hakilo.

En la humura novelo de Guimarães Rosa ni renkontas la grand-sinjoran Aŭgusto, veran brazilanon de raso apenaŭ plu ekzistanta, kies ĉefa vestaĵo estas la spronoj, kaj kiu ne disdegnas kelkfoje anstataŭigi la



El *La horo kaj la vico de Aŭgusto Matraga*

monta deklivo! Spite al ĉiuj probabloj, Aŭgusto travivas kaj atendas la momenton de la venĝo...

La ironie absurdastila novelo *La alienisto* rakontas la fondiĝon de mensmal-sanulejo en brazila vilaĝeto. Ĝia iniciatanto unue enŝlosas ĉiujn malraciulojn de la vilaĝo por poste, rezulte de scienca skismo inter du diametre diferencaj teorioj pri la origino de la homaj orgojlo kaj vanteco, anstataŭigi ilin per la alia duono de la loĝantaro. La aŭtoro distre sarkasmas kontraŭ memnomumitaj kleruloj kaj parodias la reĝetojn de vilaĝo, kiuj sin kredas ege influaj en sia anasejo. Rekomendita, kvankam la antaŭparolaj komparoj kun Balzac kaj Dostojevskij tendencas al ĉarlatana reklamo.

La longa antaŭmodernisma poemo *Joĉjo Mulato* pritraktas amon kiu frakasas la soci-hierarĥiajn antaŭjuĝojn de la tiama Brazilo. Malgraŭ interesa temo kaj soranta komenco, la finaj rezignacio kaj malkapablo de la ĉefrolulo defii la konvenciojn ŝajnas respeguli tiujn de la verkisto. Tute male, *La maskoj*, reverkita versio de Pieroto, plene indigas aĉeti la broŝuron. Kiel dolĉamara revo, spicita kun iom de la loka saŭdado, nin ensorĉas la psika portreto de du specoj de virina amo (korpa kaj spirita), reprezentataj de la kiso de Arleno respektive la revo de Pieroto.

La du lastaj floroj en la bukedo ankaŭ estas la plej belaj, kiel atestas la fakto ke ambaŭ eldoniĝis en deko da lingvoj. La bela *Inocenta* reprezentas tipan junulinon en la brazila landinterno dum la antaŭa jarcento. Ŝi vivas izolita en la domo de sia patro, zorge apartigita de ĉiuj fremdaj rigardoj, nur atendente la alvenon de la fianĉo kiun ligis al ŝi la honorvorto de ŝia patro. Sed iun tagon alvenas fremda junulo al la

patra bieno... La verkisto evidentiĝas talentojn kiuj rangas de ravaj naturpriskriboj al psikologia portretado, indigna socikritiko kaj eĉ humuro.


Finfine, *Vivoj sekaj* estas miaopinie la krono de la kolekto. Rolas familio de vakeroj, kiuj beduine travagas la landinternon por eviti la minacantan sekecmorton. Laŭ karaktero ili primitivas; ilin pelas nur la besta instinkto de travivo. Kaj jen, kiom kortuŝe bele la verkisto pripentras ilian brutecon! La rakontmaniero, preskaŭ konscienc-flua, senvualigas ke malantaŭ ilia sencerbeco ili posedas, nu ja, veran humanecon.

Jesper Lykke Jacobsen · Francio

PRAGA MANIFESTO PROFUNDE

KIO NI ESTAS KAJ KION NI CELAS. Red. O. Buller kaj R. Corsetti. Rotterdam: UEA, 1999. ISBN 92 9017 061 1. 24p. 30cm. Prezo: € 5,50.

Studkajero pri la temoj de la Manifesto de Prago: demokratio, transnacia edukado, pedagogia efikeco de Esperanto, plurlingveco, lingvaj rajtoj, lingva diverseco kaj homa emancipiĝo.



edzinon per pli kunlaborema foira putino. Kia ofendo do al lia honoro kiam iun tagon la edzino forkuras kun alia viro, kiu poste embuske lin kaptas kaj igas siajn klabistojn disdraŝi lian dorson antaŭ ol brulstampi lian postaĵon kaj ĵeti lian (supozatan) kadavron de sur

Laste aperis



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

Almanako Lorenz 2000. N-ro 20. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, 2000. 118p. 21cm. Artikoloj kaj eseoj spirismaj kaj aliaj, ekz. pri klonado kaj pri interkultura edukado. € 4,50.

Cent ĉinaj fabloj. Kompilis Gao Jingmin. El la ĉina trad. Yu Tao kaj Wang Lihua. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1999. 147p. ISBN 7 5052 0443 2. 18cm. Ilus. Fabloj el du jarmiloj, "parteto el la ĉina fablo-marŝo". € 6,00.

Ĉu vi parolas Esperante? Andrzej Pettyn (1938). Tokio: Japana E-Instituto, 1990. 96p. ISBN 4 88887 013 6. 21cm. Kurso el 28 lecionoj por hejma studado. Kun 2 kompaktdiskoj (120 min.). € 31,50.

Desegnoj – Desegnitaj bendoj – Komiksoj. Arnau Torras (1966), Kavlan (1947), Laŭrenco Septier (1951), Serge Sire. Thaumiers: La KromKancerKliniko, 1999. 21p. 30cm. Kvar pintaj bild-artistoj de LKK nun en kuna kajero. € 4,50.

Documente Esperanto 3. Red. Ionel Oneț, Sasha Vlad. Trad. I. Oneț. Berkeley: Bero, 1999. 44p. ISBN 1 882251 17 2. 22cm. Rumanlingva. Eta krestomato de tekstoj pri Esperanto (Lanti, Lapenna, Pei, Symoens, Zamenhof). € 3,60.

Esperantaj sinonimoj. Tria korektita eldono. Jaan Ojalo (1914). Rotterdam: Universala E-Asocio, 1999. 96p. ISBN 92 9017 067 0. 21cm. Sinonima vortaro surbaze de PIV. 1925 kapvortoj, indekso kun ĉ. 5500 vortoj. € 7,20. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Fabeloj kaj poemoj. A. S. Puŝkin (1799-1837). El la rusa trad. N. M. Fedotov, V. A. Golikov. Rostov-Don: Verda Kukolo, 1999. 100p. 21cm. Kvin verkoj. € 4,50.

Familio, La (1933). Bakin (1904). El la ĉina trad. Wei Yida. Poluris Li Shijun [Laŭlum]. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1999. 572p. ISBN 7 5052 0442 4. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Ilus. Yu Shouwan. Majstroverko de realismo: pro-amaj kaj generaciaj konfliktoj en "burokrat-bienula" familio en Chengdu, en 1920-21. € 24,00.

Gramatiko de Esperanto. Dua eldono plilarĝigita. Miroslav Malovec (1953). Dobřichovice: Kava-Pech, 2000. 135p. ISBN 80 85853 47 7. 20cm. Konkiza sed detala trarigardo didaktika, kun atento eĉ al stilistiko kaj demandoj de tradukado. € 15,00.

Philosophical Languages in the Seventeenth Century: Dalgarno, Wilkins, Leibniz. Jaap Maat. Amsterdam: Institute for Logic, Language and Computation, 1999. 341p. ISBN 90 5776 026 6. 24cm. Angla-lingva. Doktoriga disertaĵo. Priskribo de kaj komentoj al la filozofiaj lingvo-projektoj de Dalgarno kaj Wilkins kaj la ĉi-riktaj ideoj de Leibniz. € 26,70.

Racia kaj ateista budhismo, La. El la franca adaptis kaj trad. T. F. Beauville: Amika E-Rondo / Laŭte!, 1996. 33p. 21cm. Komparo inter la racismo kaj ateisma manieroj rigardi la budhismon. € 1,80.

Siksto kaj Sesto. Rakonto el la Abruzoj (Italio) (1913). Heinrich Federer (1866-1928). El la germana trad. Frato Bertino Goerner. Chapeco: Fonto, 1999. 96p. 21cm. Historia romaneto pri papo Siksto la 5-a (16-a jc.). € 9,90.

Vagante tra la francaj Esperanto-poŝtkartoj. Dua parto. Franca Esperantisto: Speciala historia n-ro, okt. 1999. Jean Amoureux (1937).

Paris: UFE. 86p. 21cm. Reprodukto, kun historiografiaj komentoj, de pli ol 160 kartoj de post la dua mondmilito. € 6,00.




Veraj interparoladoj de Sokrato, La. Han Ryner (ps. Henri Ner, 1861-1938). El la franca trad. (1944) E. Lanti. Beauville: SAT, 1999. 164p. 21cm. La aŭtoro prezentas la "aŭtentikajn" pensojn de Sokrato, kiujn laŭ li misprezentis Platono. € 9,30.

Vivovojo de Jesuo Kristo, La (1965). János Csohány. El la hungara trad. Tibor Papp. Debrecen: 1999. 29p. ISBN 963 03 9233 X. 21cm. Por privata kaj grupa studado. De kalvinana aŭtoro. € 3,00.

KOMPAKTAJ DISKOJ

Nune futuren. Franca kanzon'. J. Dan kaj B. Hor. [Rennes: la aŭtoroj,] 1998. 54 min. 13 kanzonoj variete-stilaj. Komponis kaj la tekstojn plejparte verkis J. Dan. € 15,00.

Survoje. La Kompanoj (M.-P. Rabiller, T. Faverial, F. Morandeau, M. Redoulez). Donneville: Vinilkosmo, 1999. 22 min. Kolekto 2000, n-ro 8. Sep originalaj kanzonoj en franca stilo, mem verkita. € 15,00.



Antverpeno, Pekino, Prago kaj Amsterdamo liveris novaĵojn ĉi-monate.

Kobo (1933). Ernest Claes (1885-1968). El la nederlanda trad. Cor Bruins. Antwerpen: Flandra E-Ligo, 1999. 231p. ISBN 90 71205 64 9. 21cm. Ilus. Jozef Cantré. Aŭtobiografia romano pri la trista vivo de knabo en malriĉa kamparana medio de Flandrio ĉirkaŭ 1900. € 24,00.

Mokrokalko la gigantegego. Gunnar Gällmo (1946). Skövde: Al-fab-et-o, 1999. 72p. 21cm. Amuza rerakonto de kelkaj epizodoj el la skandinava mitologio. € 7,50.

Nombroj. Biblia Libro. El la hebrea trad. Gerrit Berveling. Chapeco: Fonto, 1999. 105p. 21cm. Post la kvar evangelioj, Berveling novtradukis libron el la Malnova Testamento. € 9,90.

Omaĝe al Kálmán Kalocsay. Poeto de la internacia lingvo. Ada Csiszár (1930). Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro, 1999. 110p. 30cm. Ringe bind. Dua volumo de ampleksa biografio kompilaĵo daŭrigota. Prezento de Kalocsay la poeto, kun alfabetita indekso de ĉiuj liaj poemoj, kun tradukoj al diversaj lingvoj ktp. € 21,00.



PAPO: "Prosporan novjaron"

Kiel ĉiufoto ekde 1994, Johano Paŭlo la 2-a uzis Esperanton,



inter multaj aliaj lingvoj, en sia Kristnaska saluto. "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron". (F. Witdoeck, C. Sarandrea)

SAKAGUCHI habilitiĝis

La 25-an de nov. d-rino Alicja Sakaguchi (finstudinto de la Budapeŝta Esperanto-fako) akiris

ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (kie eblas studi interlingvistikon, vidu dec. '99, p. 219) la plej altan gradon en akademia kariero, tiun de habilitiĝinta doktoro, kiu rajtigas al memstara universitata instruado kaj esplorado. Ŝi habilitiĝis per la germanlingva libro (492 p.) "Interlingvistiko. Objekto, celoj, taskoj, metodoj" (Peter Lang, 1998). Dum la habilitiĝa kolokvo ŝi prelegis pri "Kreado de planlingvoj fone de la evoluo de ĝenerala lingvistiko" (teksto aperonta ĉe la universitato).

ĜUSTIGO

Ĉe la foto el la Tria Azia Kongreso (nov. '99, p. 182) ni ne menciis ke la plej maldekstre staranta ricevinto de "Flago de amikeco" estas SIBAYAMA Zyun'iti, prezidanto de la estraro de Japania E-Instituto.

ENDERBY: Esperantisto de la jaro

La revuo *La Ondo de Esperanto* iniciatis pasintjare proklamon de "La esperantisto de la jaro". En 1998 tiu titolo estis atribuita al William Auld. (Vidu feb. '99, p. 28).

Ĉi-jare 10 elektantoj povis voĉdoni por po 1 ĝis 3 el la 13 nomoj proponitaj de 9 kandidatigantoj. La 15-an de dec. estis anoncita la rezulto: **Kep Enderby 6 voĉoj; Renato Corsetti 4; N. I. Sequoyah 2; Marjorie Boulton, Reinhard Fössmeier, Antonio Herrera, GBEGLO Koffi, Ilona Koutny, Géza Kurucz, Mauro La Torre po 1 voĉo.**

La proklamo de UEA-prezidanto Kep Enderby (73-jara) kiel "esperantisto de la jaro" rekonas liajn meritojn "en la fortikiĝo de Esperantujo (aktiva partopreno en multaj kongresoj kaj tre grava parolado en la Berlina kunsido de la Strategia Forumo de la E-komunumo) kaj en la eksteraj rilatoj (precipe pro la sukcesa aktivado en la Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Seulo)." (H. Gorecka)

TUINDER: Juneca Nestoro

En *Nestor*, monata organo de la nederlanda Unuiĝo de Katolikaj Ligoj de Gemaljunuloj (kun 250 mil anoj), kvarpaĝa artikolo kaj kovril-foto prezentis en novembro la 67-jaran Jacques Tuinder, precipe liajn 33-jaran batalon kontraŭ evitebla blindeco kaj E-agadon (vidu jan. '98, p. 5). Tuinder deklaras tre junece: "se la difektoj [de maljuneco] ne aperas, oni evidente ne sentas sin maljuna... la vivo estas plena je defioj. Se oni estas feliĉa kaj sana, tio donas devojn." (Nederlanda Katoliko)

FACILLINGVA

KONTAKTO

KONKURSO

Verku artikolojn pri ĉiaj temoj, per ne pli ol po 800 vortoj, en "facila" aŭ "tre facila" lingvaĵo, laŭ la vortlisto de *Kontakto* (vidu ties n-ro 1/2000) kaj sendu ilin al *Kontakto* (p. k. 405, BG-9000 Varna, Bulgario; kontakto@esperanto.org), indikante viajn nomon, adreson kaj la nivelon en kiu vi verkis.

Ni havas kvar limdatojn: 1 marto, 1 jun., 1 sept. kaj 1 dec. La gajninto de ĉiu trimonata periodo ricevos belan T-ĉemizon de *Kontakto*, kaj la gajninto de la tuta jaro — valoran libropremion. Surprizaj premioj rekompencos ankaŭ la plej bonajn sciencajn artikolon, originalan fikciaĵon ktp. Akceptotaj estas nur originalaj verkoj, kun ne pli ol po 5 vortoj ekster la vortoliston (do, klarigendaj).



HUNGARIO: Kongresejo brulis

Precize la 15-an de dec., je la kvina horo matene, incendio detruis ĝis kompleta neuzeblo la Budapeŝtan Sporthalon, okazaĵoj de la 68-a UK en 1983. La kialo de la brulo estas nekonata;



Hungara Vivo

AZERBAĴĜANO: Asocio

La 21-an de okt. dudeko da esperantistoj kaj subtenantoj fondis en Baku Azerbajĝanan E-Asocion. (Ŝ. Mamedov)

POLLANDO: Inter religioj

10 partoprenantoj el 5 landoj diskutis en la 5-a Interreligia Seminario E-ista (8-13 aŭg., Kędzierzyn-Koźle) pri i.a. la es-tonteco de religio en la nova jar-milo kaj la koncepto de justa milito, konsidere al la Kosova krizo. (Asistilo)

fajr-estingista raporto estas atendata por la mezo de februaro. (Magyar Hírlap, Magyar Narancs)

JAPANIO: Interfluo

La e-istoj de Kanazawa unuafoje ĉeestis en la "Tagoj de internacia interfluo" kaj havis simplan E-ekspozicion.




Zorge de Lin Wenxian kaj Yu Wang

MEKSIKO: Mielo el ĉielo?

"100% Pura abelmio el la abel-
ejoj de l' Meksika E-Federacio

legeblas, Esperante kaj hispane, sur la etiketoj de mielo kies vendo-




kun internacia
Kvalito por eksterlandigo": tio

profito servas
por subteni la agadon de MEF.
(A. Orellana Rojas)



Kun viaj kontribuajoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Koran dankon!

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enhavtabelo.



ANONCETOJ

LIGO DE SAMSEKSAMAJ GE- ESPERANTISTOJ (LSG) batalas

kontraŭ antaŭjuĝoj, interkona-tigas samseksamajn geesperan-tistojn, informas pri Esperanto inter lesboj kaj gejoj. Por pliaj informoj kaj senpaga ekzem-plerio de *Forumo*, nia membrogazeto, skribu al: LSG, p/a Vosdaalstraat 26A, NL-6141 BT Limbricht, Nederlando. Aŭ rete: lsgx@yahoo.com. Ĉio sendiĝos en neŭtrala, fermita koverto.

ESPERANTO-PARTIO DE BRITIO

fondiĝis la 15-an de dec. 1999, kun la ĉefcelo proponi kandi-datojn por EP en 2004. E-istoj tra la tuta EU kaj aliĝontaj landoj fondu proprajn E-partiojn lan-dajn. Ni laboru kune. Adreso ĉe la sekretario: E-Partio de Britio, c/o Neil MacKilligin, Flat B, South Myrtles, 46 The Esplanade, Burnham-on-Sea, Somerset, TA8 2AQ Britio; ☎/✉+44/1278/783-392; ☐officejo@e-p.org.uk.

FORVENDIĜIS LA 3000 ek-

zemplerioj de *La eta princo* en Esperanto. Bonvolu provizore ne plu mendi ĝin. Libroservo de Kanada Esperanto-Asocio.

CENT KORUSANOJ SERĈATAJ

por prezenti *Canto general* de Mikis Theodorakis en la festiva-lo KAFE (Tuluzo, Francio, 5-9 jul.). Krome, muzikistoj (pianoj, flutoj, gitaroj, perkutiloj) kaj solistoj; ankaŭ partituroj de la instrumentaj partoj. Informoj kaj kontakto: Manjo Clopeau, 6 rue J.P. Calloch, F-22000 St-Brieuc, Francio; ✉+33/2/96-94-08-54; ☐manjo.clopeau@wanadoo.fr.

EN JAPANIO ONI SERĈAS E-

instruiston, prefere por duona, preferege por tuta jaro aŭ plu-jar. Instrukapablo de la angla lingvo estas avantaĝiga. Entu-ziasmo kaj bonvolo pli gravas ol sperto. La salajro estas bona, flugoj repagataj. Por ĉiaj infor-moj, kontaktu Lode Van de Velde; ☐lode@fel.esperanto.be (mi mem laboris tie du jarojn).

PERLABORI ANGLE, KROM-

LABORI ESPERANTE: Univer-sitatoj en Pekino urĝe bezonas kompetentulojn por instrui la anglan kaj E-on (al partopre-nontoj de la Honkonga UK). Monata salajro egala al 200-250 us. dolaroj; malmulte, sed sufiĉe por vivteni tri homojn en Ĉinio. Senpagaj manĝoj kaj memstara loĝejo. 1-2 fojaj enlandaj sen-pagaj vojaĝoj ĉiujare. Tamen oni devos mem pagi la veturkostojn ir-revenan. Spertu Ĉinion! Kontakto: ☐dedhea@public.wh.hb.cn.

JUNULON POR PAGATA TAS-

KARO bibliografia / arkiva ser-ĉas la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (rilatanta al Centro de Esploro kaj Doku-mentado). Interesatoj turnu sin al Humphrey Tonkin, Univer-sity of Hartford, CT-06117-0395, West Hartford, Usono; ☐tonkin@mail.hartford.edu.

M. REZA TORABI KAJ FARIBA

NURI MAJD oficiale ekkunvivis. P.K. 184, IR-17765 Tehran, Irano; ☐reza@esperanto.org.




ARMENIO: Verdo sur Paletro

Palitra, revuo de Armena Asocio de Kulturaj Ligoj kun Eksterlando, publikigis ruslingvan tradukon de Araksja kaj Lida Elbakjan el la artikolo "Duobla gastamo en Jerevano" de Doron Modan, aperinta en nia revuo (jan. '99, p. 5) pri la armena E-movado.

FINNLANDO: Plie bildojn

13 aktivuloj seminariis en Jyväskylä (13-14 nov.) pri informado. Ili ideis varbokampanjon kun broŝuro tipografie loga, pli riĉa je bildoj ol je teksto, celanta precipe la aĝogrupon inter 20 kaj 40 jaroj. Ĉe E-Asocio de Finnlando estos fondita reag-grupo, dononta al amas-informiloj oficialan opinion en EAF-koncernaj aferoj, kaj grupo por informi

Esperantistaj retadresoj 1993-2000



INTERRETO: Kvara milo komencita en la jaro 2000

La 1-an de jan. la "Adresaro de rete atingeblaj e-istoj kaj E-organizaĵoj" (estro: Derk Ederveen) enhavis 2989 adresojn de 2008 e-istoj el 82 landoj. Intertempe la tria milo certe kompletiĝis.

Jen la ciferoj por la supra grafikajo. La 11-an de feb. 1993: 219 personoj havis 310 adresojn (en 26 landoj). 1 jan. 1994: la koncernaj ciferoj estas resp. 364, 528 kaj 37. 1 jan. 1995: 485, 688, 44. 1 jan. 1996: 624, 876, 50. 1 jan. 1997: 959, 1255, 61. 1 jan. 1998: 1321, 1781, 65. 1 jan. 1999: 1650, 2346, 71. 1 jan. 2000: 2008 personoj, 2989 adresoj, 82 landoj. (La konataj hejmpaĝoj nombris 181 en 1997, 339 en 1998, 438 en 1999, kaj 602 la 1-an de jan. 2000.)

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Belgio: Ite Tytgat. **Brazilo:** James Rezende Piton. **Bulgario:** Ivanka Stojanova. **Germanio:** Gerd Bernhard; Nikola Markarian. **Hispanio:** Pedro María Sanz Sanz. **Kanado:** Ethel Alexander. **Kostariko:** Hugo Mora Poltronieri. **Nederlando:** Roel G. Haveman. **Svedio:** Henrik Randehed.

NOVAJ DUMVIVAJ PATRONOJ DE TEJO

Germanio: Albrecht Kronenberger. **Japanio:** Joel Brozovsky; Kikusima Kazuko. **Kanado:** Manuel M. Campagna; Barclay D. Johnson. **Luksemburgio:** Brian R. Moon; André Ruysschaert.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

Subtenanto (min. \$25): **Hispanio:** R. Urueña de Hernández.

Amiko (min. \$10): **Kanado:** K. F. Price.

PATRONOJ DE TEJO 2000

Belgio: Grégoire Maertens. **Finnlando:** Allan Mehtonen; Albin Backholm; Heta Kesälä; Akseli Kirsilä; Anja Karkiainen; Synnöve Mynttinen; Tiina Oittinen; Raita Pyhälä; Vuokko Tellervo Heinäsuo. **Francio:** Alain Pialla; Michel Cavelan; Bérengère

Cheverry; Claude Longue-Épée; Eskil Svane; Gaston Fournier; Gustave Blary; Henriette Cortes; Jean Dalet; Jacques Decobert; Jean-François Clet; Maurice Feneyrol; Odile Masseron; Pierre Cheynet; Paulette Naulet; Roger Despiney; Richard Cash; Renée Triolle; Bert Schumann; Laurent Vignaud; Yvette Nicaise-Pierre; Pierre Lelièvre. **Germanio:** August Franke; Florin Caragea; Franz Knöferl; Gisela Macioszek; Rokuro Makabe; Maria Vitalyos; Nora Caragea; Franziska Reisel; Thomas Bormann. **Hungario:** Péter Pál Denke. **Israelo:** Jehoŝua Tilleman. **Italio:** Gianfranco Polerani. **Japanio:** Anna M. Steffes; HUKUMOTO Hiroto; SIBAYAMA Zyun'iti; Kazuyuki Hosomi; Koichi Kai; Mayumi Kinoshita; Utako Kobayashi; KODAMA Hiroo; SIMADA Sunao. **Kostariko:** Francisco Darcia. **Nederlando:** F. J. Pieterse-Kruger; Hans ten Hagen; J. Soeteman; Louise Adelaar; Marc van Oostendorp; W. L. van Leeuwen. **Usono:** Gigi Harabagiu.

SOCIETO ZAMENHOF 2000

Argentino: Mariano D. Ibáñez; Rodolfo G. Calógero. **Aŭstrio:** Sieglinde Stamm. **Belgio:** Elfriede Ernst; Grégoire Maertens; Marie-Louise Vanherk. **Britio:** Adrian Vincent-Jones; John C. Wells. **Danio:** Ejnar Hjorth. **Finnlando:** Heta Kesälä; Anna-Liisa Heikkinen; Juho Pyykönen; Meri Lehtinen; Synnöve Mynttinen; Unto Seppälä; Veikko

Tikkanen. **Francio:** André Albault; Jean Amoureux; André Loisel; Claude Longue-Épée; Clara Troper; Denise M. H. Loisel; Féodor Jelenc; André Gilles; Auguste Huberdeau; Henriette Cortes; Hélène Gauducheu; Jeannine Croze; Jean Gibaux; Jean-Paul Beau; Jeannine Vincent; Louise Marin; Maurice Feneyrol; Odette Bernet; Pierre Métivier; Raymond Boré; Roger Despiney; Julien Ducrocq; Sonia Amariglio; Marc Savre; Jean-Louis Texier. **Germanio:** August Franke; Alexander Putze; Harry Billy; Bruno Vogelmann; Elisabeth Hirsch; Martin Gründler; Gisela Macioszek; Heinz Schindler; Heinrich Nischwitz; Helmut Welger; Julie Winter; Helmut Klünder; Rokuro Makabe; Jean Prager; Richard Hirsch; Michael Scherm; Werner Bormann. **Hispanio:** Laurentina Parada de Palacios; L. E. Hernández García; Jesús Raposo Montero; Rafaela Urueña de Hernández. **Hungario:** Péter Pál Denke. **Israelo:** Josifa Rabino. **Japanio:** Kyotaro Deguti; HUKUMOTO Hiroto; Kazuyuki Hosomi; KIKUSIMA Kazuko; KUROYANAGI Yositaka; Mituo Gotou; Kyōhei Nakazima; Nobuo Sakurai; Kōiti Simizu; SIMADA Sunao; Nobuyuki Syōzi; Keiko Syōzi; TAKEUTI Yosikazu; Hiroshi Takahashi; Tume Saitō. **Kanado:** Marijke Meijer. **Korea Resp.:** Kim Yungmyung. **Luksemburgio:** Brian R. Moon; Claude Nourmont. **Nederlando:** G. A. M. v. Bergeijk;

El Oslo, pri Prago

En Norvega *E-isto* ('99/6) Bård Hekland aperigas du intervjuojn kvazaŭ paralelajn, kun Ziko M.

Sikosek (aŭtoro de *Esperanto sen mitoj*; vidu majo '99, p. 92) kaj kun Mark Fettes. Laŭ Sikosek la Praga Manifesto (sep. '96, p. 146) "plenas je fanfaronaj asertoj pri E-o kiel neŭtrala solvo de ĉiuj problemoj" kaj "prezentas la tezojn kiel komunajn opiniojn de la esperantistoj". Fettes, verkinta la Manifeston, klarigas ke ĝi spegulas la pensojn de

"libere subskribintaj unuopuloj" (ĝis nun ĉ. 13 mil) kaj konceptas E-on ne kiel LA solvon, sed kiel kontribuon "al la plibonigo de homaj vivoj kaj homaj socioj".

Heroldo: Parte nova skipo

Aleksandr Korjenkov adiaŭis kiel vicredaktoro de *Heroldo de Esperanto*, restante en la sepkapa skipo de kunlaborantoj. Nova

vicredaktoro estas, de decembro, la slovako Stano Marček (47-jara), redaktinto de *E-ista Vegetarano* kaj *E-isto Slovaka*, iama manaĝero de la rokgrupo Team' (kiu eldonis kasedon en E-o). Specifajn numerojn de *Heroldo* kunordigos ne plu Sabira Ståhlberg, sed Stefan MacGill (51-jara novzelandano vivanta en Hungario, iama direktoro de la CO).

la lokan kaj ĝeneralan publikon pri E-aranĝoj. (*Esperantolehti*)


GERMANIO: "Ĉu Esperanto de malhomeco?"

"La militisma cinikeco parolas tutmonde la saman Esperanton, tiun de la malhomeco" — frazis ĵurnalisto Karl Grobe en artikolo pri Ĉeĉenio, en decembra numero de la gazeto *Frankfurter Rundschau*. Walter Klag (Vieno) retmesaĝe protestis ĉe la redakcio kontraŭ tia "asociado de Esperanto kun genocido".

NEDERLANDO: Ofensivo 2000

Dum tri decembraj semajnoj en kulturaj kaj studentaj ejoj haveblis du novjaraj bildkarto kiujn la landa asocio Esperanto Nederland publikigis en 300 mil ekz. La asocio ankaŭ mendis, tra pluraj semajnoj, koncizan anoncon en la senpage distribuata gazeto *Metro*. ("Ĉu survoje? Lernu Esperanton en la trajno. Vi atingos

foren.") Ĉi-jare ekaperas nederlandlingva informa periodaĵo,



Monditaal. La muzeo pri Theo Thijssen (vidu dec.



'99, p. 219) konstatas ke pro la speciala E-rilata ekspozicio venas pli da vizitantoj ol ĝenerale. (*FEN-X*)

G. F. Makkink; Huibert Oortwijn; Hans ten Hagen; E. C. Klaver; Louise Adelaar; Maud Meijwes; Joop W. Moonen; Marc v. Oostendorp; N. Overwater; Sija v. Wijngaarden; Simon P. Smits; Yfke Weidema. Norvegio: Kjell Peder Hoff; Tamiko Kaŭakami-Nielsen; Olav Reiersøl. Slovakio: Helena Seres. Svedio: Martin Häggström; Harald Andersson; Inga-Maj Lindkvist; Lennart Svensson; Leif Holmlund; Nils Gustav Johansson; Sam Fritz; Tore Johansson. Svislando: Furio Gabbrielli; S. Kaufmann. Usono: Gigi Harabagiu; Jane Edwards; Lucille C. Harmon; Robert A. Swenson; William R. Harmon. Venezuelo: Juan Eduardo Bachrich.

DONACIOJ 1999 (EUR)

ĝis la 31-a de decembro

Asocia Kapitalo: Sumo tutjara: 84 999,28.

Fondaĵo Afriko: Britio: A. Vincent-Jones 22,82. Germanio: F. J. Braun 35,79. Hispanio: J. Raposo Montero† 15,00. Nederlando: L. Adelaar 90,76; C. Bossong-Singer 15,63; A. M. H. Dodebier 42,75; Instituto Hodler 88,02; F. H. Kat 20,25; B. Muizelaar-Borger 453,78; B. de Wit 226,89. Svedio: U. Luin 100,00. Sumo tutjara: 17 894,26. Fondaĵo Ameriko: Hispanio: J. Raposo Montero† 15,00. Sumo tutjara: 3209,44.

Fondaĵo Azio: Hispanio: J. Raposo Montero†

15,00. Japanio: Esperanto-Densyusyo Sue 19,18; Y. Hayakawa 19,45; K. Hayasi 19,47; K. Hirose 19,18; M. Itabasi 19,48; T. Itou 19,48; M. Iwai 19,45; Y. Izumi 19,17; K. Kobayasi 19,48; S. Miyamoto 19,47; S. Okutu 19,48; Y. Ootuka 19,45; W. Schmid 38,10; T. Suzuki 58,42; M. Tahira 38,95; H. Tai 19,17; Y. Takeuti 95,88; H. Todoroki 19,17; M. Toyoda 29,21; T. Unoki 25,90; S. Yamazoe 19,18; S. Yosikawa 19,47; T. Yosi-mura 19,47. Sumo tutjara: 3860,96.

Biblioteka Fondaĵo: Nederlando: R. Moerbeek 45,05. Sumo tutjara: 45,05.

Fondaĵo Canuto: Aŭstrio: L. Patek 5,00. Francio: J. J. Aumeunier 30,49; R. Ballaguy 20,58; L. M. Berthelin 18,29; H. Cortes 30,49; A. Georget 8,38; R. Lebrun 15,25; C. Longue-Épée 15,25; D. Mackenzie Peers 23,63; L. Marin 45,73; M. Massemin 17,53; A. Peyron 15,25; J.-C. Trébouet 15,25. Nederlando: A. Beuzenberg 56,37; F. H. Kat 22,51; R. Moerbeek 45,05; B. Muizelaar-Borger 453,78; M. van Oostendorp 14,85; D. van Zanten 27,23. Sumo tutjara: 5146,04.

Konto Espero: Britio: A. Vincent-Jones 22,82. Hispanio: L. E. Hernández García 20,00. Japanio: M. Aoki 32,10; E-Rondo de Numazu 31,64; Kobe E-Societo 2897,73; K. Iino 62,86; Y. Takeuti 94,92; S. Yamasaki 31,43. Nederlando: M. B. v. Bentum - v. d. Broek 45,38; R. Moerbeek 45,05;

B. Muizelaar-Borger 453,78. Sumo tutjara: 9916,90.

Fondaĵo Grabowski: Francio: T. Nowak 96,04. Sumo tutjara: 107,38.

Junulara Fondaĵo: Sumo tutjara: 1070,13.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Sumo tutjara: 1525,93.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Brazilo: G. R. Ledon 17,10; S. S. Ledon 8,55. Germanio: H. Muhsal 20,00. Nederlando: C. M. Balk v. d. Teems 10,00; J. Bosse-Sibbel 25,00; H. Scholten 1,88. Slovakio: A. Komlósi 10,00. Usono: R. F. Grossman 30,00. Sumo tutjara: 1203,29.

Volontula Fondaĵo: Francio: H. Cortes 30,49; L. Marin 45,73; J.-C. Trébouet 15,25. Nederlando: A. Beuzenberg 54,45; P. Schuil 10,99. Sumo tutjara: 8214,14.

Kampanjo 2000: Italio: C. G. 258,23. Nederlando: R. Moerbeek 45,05. Sumo tutjara: 2108,91.

Ĝenerala Kaso: Francio: M. Feneyrol 1524,49. Germanio: W. Ehlers 3,07; R. Klag 0,57; M. Gründler 28,63; W. Hohl 0,74; J. Radam 3,07. Nederlando: P. de Blaeij 3,72; P. A. Buijsters 19,72; G. F. Makkink 309,78; A. W. Treurniet 58,64; F. D. v. Zoest 11,35. Svedio: U. Luin 50,00. Sumo tutjara: 5813,16.

Renovigo de la Domo: Sumo tutjara: 11,34.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Restituto ALBERO GARCÍA (1906-1997), delegito dum tri jardekoj en Burjasot (Hispanio), forpasis antaŭ pli ol du jaroj.

Tomás APRAIZ RIBERAS (1915-1999), kvardekon da jaroj delegito en Bilbao (Eŭskio, Hispanio), mortis la 23-an de oktobro. Li agadis dum multaj jaroj kiel prezidanto, sekretario kaj vicprezidanto de la loka klubo.



Komplezo de Bolafin

Rudolf BALEJÍK (1920-1999), delegito pri sporto, vegetarismo kaj naturismo en Trenčín (Slovakio), mortis la 6-an de septembro.

Petko BONEV (1921-1999), malnova membro, longtempe delegito en Stara Zagora (Bulgario) kaj fakdelegito pri turismo, gastigado kaj kemio, eks-estrarano de

Bulgara E-Asocio, forpasis la 24-an de septembro.

Julia GUILLAUME-ISBRÜCKER (1916-1999), filino de Julia Isbrücker (la fondintino de Internacia E-Instituto en Hago), mortis la 29-an de novembro en La Celle-Saint-Cloud (Francio). Vidvino de Jean Guillaume (i.a. ĉefdelegito por Francio dum 30 jaroj), ŝi ĉiam aktive partoprenis en E-aranĝoj kaj estis ĝis 1996 estraranino de IEL.

W. A. M. VAN HEUGTEN (1913-1999), ĵurnalisto, verkisto, kiu en la 30-aj jaroj prelegis diverslande en Eŭropo kaj utiligis siajn E-kontaktojn en sia ĵurnalisma laboro, mortis la 12-an de oktobro en Deurne (Nederlando).

IKAWA Satio (1924-1999), estrarano (1983-) kaj prezidinto (1988-89) de la estraro de Japana E-Instituto, forpasis la 5-an de decembro en Tokio.



Komplezo de Andreas Nordström

Erik JOHANSSON (1908-1999) forpasis la 31-an de aŭgusto en Gotenburgo (Svedio). Esperantisto de junaĝo, ekkoninta sian nederlandan edzinon Jo en E-kongreso, li aktivis

i. a. kiel prezidanto de E-Societo de Gotenburgo (1977-82) kaj de la Gotenburga sekcio de Kristana E-ista Ligo Internacia.

Félix NAVARRO CLEMENTE (1908-1999), antaŭe delegito pri edukado en Valencio (Hispanio), aŭtoro de *Curso práctico elemental de Esperanto* (1987), forpasis en julio.

NIWA Masahisa (1913-1999), 60 jarojn esperantisto, 50 jarojn membro de UEA, mortis la 24-an de oktobro en Nagoya (Japanio), kie li estis vicdelegito ekde 1951 kaj poste delegito. Pro la gvidado de la regiona E-movado li ricevis en 1957 Premion Ossaka, la plej prestiĝan en la japana Esperantujo. Li servis sinsekve kiel konsiliano, inspektoro kaj konsilanto ĉe Japana E-Ligo. Li tradukis la infanrakonton *Vulpoj de Ĉironmup* (1979).



Komplezo de La Revuo Orienta

YANG Zongkun (Jariĉ, 1937-1999), instruisto, mentoro de junaj e-istoj, forpasis la 3-an de septembro en Wuhan (Ĉinio). Individua membro de UEA ekde 1970, li estis unu el la tre malmultaj ĉinaj UEA-membroj en tiu tempo.

Marie BARTOVSKÁ (1912-1999), Honora Membro de UEA kaj de Ĉeĥa E-Asocio, mortis la 8-an de decembro 1999 en Frýdek Místek (Ĉeĥa Respubliko).

Bartovská naskiĝis la 29-an de julio 1912. Unue rifuzita de lernejo pro sia miopeco, nur post laboro en tolaĵfabriko ŝi sukcesis ekstudi — pri komerco, kvankam ŝi volis fariĝi instruisto.

Esperanton ŝi lernis en la 30-aj jaroj. Post aktivado en pluraj kluboj, ŝi fondis en 1951 tiun de Frýdek Místek. Ŝi multe instruis kaj de 1965 gvidis ĉiumonatan “Kafejo Esperanta”.

Sperta pri la tekstil-faka terminologio, ŝi kontribuis tiufake i. a. al PIV. Malgraŭ aĝo, malsanoj kaj vidhandikapo, ĝis lastatempe ŝi ofte aperigis leterojn en la E-gazetaro (i.a. en nia revuo) kaj partoprenadis aktive fakajn aranĝojn, ekz. prelegante en 1998 pri la terminologio de brodado en la 1-a Kolokvo pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko. Longtempa delegito de UEA, modelo de tutviva sindediĉo al lingvo kiu fariĝis universitato de ŝia vivo, ŝi estis konata aktivulino en sia lando ankaŭ sen okupi centran movadan postenon.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; ✉ +61-2-9555-9705; ☐ kependery@bigpond.com.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ✉ +39-06-957-66-33; ☐ corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ✉ +39-06-39-72-61-69; ☐ lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; ✉ +420-2-991-2126; ☐ chrdle@telecom.cz.

Estrarano (Afrika agado): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ☐ esp.togo@cafe.tg.

Estrarano (kulturo, landa agado): s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/✉ +81-75-711-45-58; ☐ jasu-k@mac.email.ne.jp.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ☐ kalle@esperanto.se.



ORGANIZA SOCIETO DE INTERNACIAJ ESPERANTO-KONFERENCJOJ

Internacia Esperanto-Konferenco 2000

Multkultureco, multlingveco kaj kunvivado
en Motovun (Istrio, Kroatio) 15-21 de julio 2000

samtempe:

6-aj SOMERAJ KURSOJ

poste:

tritaga ekskursi programo

kaj

flugoj al 85-a UK en Tel-Aviv

(el Ljubljana kaj Venecio)

Orbis pictus de Višnja Brankovič, Via Leghissa 6,
IT-34131 TRIESTE; ☎/✉ +39/040 767 875;
□ orbispictus@iol.it

AIKIDO-SPERTULOJ TURNAS KONTRAŬE LA FORTON DE LA KONTRAŬBATALANTO



La forto de la angla lingvo estas ke milionoj da homoj
volas ĝin lerni. Sed la lingvo estas stumbligema. Post
longa lernado oni kapablas ĝin legi, sed nur malmultaj
kapablas verki aŭ paroli senerare.

Everyone's Own Language

[Ĉies propra lingvo]

invitas legantojn *uzi* la anglan por lerni lerneblan
lingvon. Ĵurnalistino ene rakontas kiel ŝi trovis
Esperanton, legis Valane, kongresis, diplomiĝis pri
lingvistiko. *Everyone's Own Language* celas kaj
angla-lingvanojn kaj lernintojn. Ĝi informas kaj bone
instruas.

Dublin: Nitobe Press, 1999. 188p. ISBN 0 95352 840 5.
Mendebla ĉe Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue
Wood, Dublin 12; □ esper@indigo.ie; UEA, ELNA kaj JEI.

APERIS

scienca revuo

n-ro 4 (179) - vol. 50 (1999)

ENHAVO

Simetriaĵoj strukturoj en la muziko (ISAE-Prelego 1999) Franz-Georg Rössler (DE)	3
Anatomiaj ŝanĝoj de nazaj strukturoj en patogeneco de eksuda meza otito N. I. Ŝigajev, O. U. Stratiĵeva (RU)	17
Modelekspertoj pri hidroteknikaĵoj objektoj de montara akvorezervejo Ottó Haszpra (HU)	21
Biologia imunigo de terpoj kaj ĝiaj perspektivoj Ludmila Pusenkova (RU)	36
Elementarstrukturo de la materio. Unueca strukturala kvantumkampteorio de la materio kaj gravito Burkhard Heim (DE), Recenzo R. Hauger (CH)	44
Korpmundoj – la fascineco de la malfalso Ekspozicio de Gunther von Hagens, Recenzo R. Hauger (CH)	50

Internacia Scienca Asocio Esperantlingva

ISAE-Sekretario R. Hauger, Ringstr. 13, CH-8172 Niederglatt
Jarkotizo 30,-CHF, Poŝtekkonto 80-5909-0 "ISAE", Zürich, Svisio

ANONCU EN LA ELDONAĴOJ DE UEA KAJ TEJO!

(Prezoj en EUR)	1/1p.	1/2p.	1/4p.	1/8p.	1/16p.
Esperanto	1000	550	300	165	90
Kontakto	350	190	100	55	30
Kongresa Libro*	225	125	70	–	–

Por Esperanto-organizaĵoj 50%-a rabato.
Makleraĵo de 30% al varbinto de ne-movada anonco.
Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble.

*LIMDATO:

Kongresa Libro: 2000 03 31.

ANONCETOJ:

En Esperanto: por ĉiu vorto unu internacia respond-
kupono (=0,73 EUR).

En Kontakto: por tri vortoj unu internacia respond-
kupono.

En la Jarlibro: por ĉiu komencita linio unu dekono
de la MA-kotizo de la koncerna lando (oni ĉiam
fakturas minimume du liniojn).

En eldonaĵoj de UEA kaj TEJO via anonco atingos
la plej vastan publikon!

Internacia Seminario pri Eŭropa Integriĝo **INTERNACIA JUNULARA FESTIVALO**

19.-25.04.2000
en Carallino (Venecio), Italio

subtenata de Eŭropa
Junulara Fondaĵo



"ĈU ESTI AŬ NE ESTI EŬROPANO?"

Ĉi-foje kun aparte favoraj financaj kondiĉoj.
Informiĝu kaj tuj aliĝu!

<http://www.esperanto.org/internacia/TEJO/>
<http://www.esperanto.it/iej>
tejo-officejo@esperanto.org

Pri Amazonio, nuntempe konsiderata LA PULMO DE NIA PLANEDO, pere de ĉi tio mi iniciatas projekton de libro ĉirkluligota en plej eble multaj lingvoj nuntempe parolataj en la mondo, uzante Esperanton kiel pontolingvon. Brazila eldonejo interesiĝis pri mia finverkata AMAZONIA URNO entenanta ties riĉegan regionan legendaron, ĉefe indian-devenan.

La libro, abunde ilustrita, en sia UNUA PARTO entenas ĉiun eron en Esperanto kaj en unu el la aliaj lingvoj por kiu tradukanto estos trovita. La DUA PARTO, nigre-blanka, entenas la kompletan tradukon en ĉiujn lingvojn reprezentatajn. La eldonisto intencas krome enmeti TRIAN PARTON, ankaŭ koloran, kun belaj fotoj pri Amazonio, ĝia faŭno, ĝia flaŭro kaj kialo de ĝia graveco por nia planedo.

La Esperanta kaj la portugala parto estas de mi verkata kaj devas esti eldonita en 2001, entute 30 000 ekzempleroj kaj 500 en ĉiu el la lingvoj akompanantaj Esperanton. Ne necesas paroli pri la gajnoj por Esperanto: firmigi ĝian pozicion kiel vera kaj neŭtrala internacia lingvo. Mi do atendas proponojn pri tradukoj en aliajn lingvojn fare de la respektivaj spertuloj. Por la serĉata patrono, ano de la riĉa internacia petrol- kaj energiindustrio, la libro estos prestiĝodona; li tial volonte tantiemos la kunaŭtorojn. Ek al laboro! Leopoldo Knoedt, Parque Encontro das Águas, Q G L 10, BR-42700-000 Lauro de Freitas - BA, Brazilo; leopoldo@svn.com.br.

Kongreso sur via koverta

Ideala ornamaĵo por viaj leteroj en la monatoj antaŭ Tel-Avivo, la kongresa glumarko estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA: € 1,35 po unu folio de 15. Triona rabato ekde 3 folioj.



KEF 2000

17.-23.7.2000 en Helsinko, Finnlando



- | | |
|-----------------------|--------------------------|
| • Griša Arosjev | • Anja Karkiainen |
| • Jorge Camacho | • Jouko Lindstedt |
| • Liven Dek | • Flo Martorell |
| • Dolcxamar | • Gonçalo Neves |
| • Esperanto Desperado | • Persone |
| • Miguel Fernández | • Stomakoj |
| • Kim Henriksen | • Sabira Ståhlberg |
| • teatra grupo | • Arnau Torras |
| • Ibere libere | • Antonio Valén |
| • Ĵomart kaj Nataŝa | • teatra grupo Variantoj |

**KIO PRI VI? NE ENUU!
TROVU LA BONAN ETOSON!**



Pliaj informoj:
www.esperanto.fi/kef2000.html
aŭ
Kultura Esperanto Festivalo
Siltasaarenkatu 15 C 65
FI-00530 Helsinki, Finnlando

POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ. Jaan Ojalo (1914). Rotterdam: UEA, 1999 (3-a, korektita eld.). 96p. Prezo: € 7,20.

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭ-sinonimoj. Por helpi en tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi vortaron. Bazita sur PIV, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indekson. Taŭga fonto por ĉiu kiu volas pliriĝi sian vortostokon.

